E/330

HUNGARA VIVO

1
1981
13,– Ft



Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

BÁV

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANĜEBLA

en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj. 43.
Hotel Intercontinental – Hotel Gellért

Konsumturist



HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u.6. H–1081
Poŝta adreso: Budapest,
Pf.193, H–1368
Aperas dumonate
XXIa jaro, 1981 n-ro 1
(95)

ENHAVO

Horváth, J.: Kosmonaŭto kaj Esperanto (Interparolo kun B.*Farkas*) 2
Lengyel, M.: Kion povas fari turistoj por la interkompreniĝo 4
Internaciaj Esperanto-aranĝoj en Hungario dum 1981 5
Auld, W.: Kio estas la Akademio de Esperanto? 7
Kalocsay, K.: Tutmonda Sonoro 8
Serényi, P.: Intervjuo kun Pelé (E.*Fenyvesi*) 11
Benczik, V.: Eksterlando por Eŭropanoj 12
Váci, M.: Plej-epoko (D-ro M.*Fehér*) 13
Torda, I.: Jarcentoj de la hungara literaturo 11. (P.A.*Rados*) 14
József, A.: Panjo (J.*Varga*) 15
Tófalvi, É. – *Kníchal*, O.: Kiuj semas plorante (fragmento) 16
Kock, E. de: Saronstrato 5 18
Gabrielli, L.: Maldolĉeco 18
Korínek, J.: Tri cignoj 18
Varga, J.: Epitafo 18
Francis, J.I.: Timo 18
Gergely, M.: Soldatoj de Lajos Szalay 19
Farkas-Tatár, É.: Panoramo 20
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 23
Fenyvesi, E.: Ni prezentas nian kunlaboranton pri medioprotektado 24
D-ro *László*, F.: La Muzeo pri Akvoaferoj en Esztergom 25
Paĝo de komencantoj: Ukraina popola anekdoto 31
Bálint, Sz.: La fidela edzo 32
Gaja paĝo (E.*Fenyvesi*) 33
Golden, B.: Esperanto kaj la magnetofono 35
Recenzoj de V.*Benczik*, E. *Fenyvesi*, G.*Mihalkov* 37
Mihalkov, G.: Ekzameno sen risko 39
Leterkesto; Korespondi deziras 40

Sur la titolpaĝo: Dancgrupo en folklora festo en popola kostumo de Hortobágy

„Esperanto en la kosmo..."

– jen la temo de la unua artikolo de tiu ĉi numero, kiu komencas la 21-an jarkolekton de Hungara Vivo. La hungaran kosmonaŭton Bertalan *Farkas* intervjuas lia iama klaskamarado, Jozefo *Horváth*, aŭtoro de la furoranta lernolibro «Esperanto dum 30 tagoj». Same grava estas ankaŭ la sekva artikolo, kiu venas el la plumo de la vicprezidanto de la Hungarlanda Turisma Oficejo.

Du pliaj intervjuoj vigligas tiun ĉi numeron: la famega *Pelé* ne bezonas prezenton, kaj verŝajne ĉiuj esperantistoj volonte legos liajn favorajn komentojn pri la Internacia Lingvo. La alia intervjuito estas d-ro Ferenc *László*, nia kunlaboranto pri medioprotektado – niaj legantoj ĝis nun povis koni lin nur per liaj verkoj: nun ni havas la okazon iom pli senpere prezenti lin.

Ne mankas ankaŭ Esperantaj temoj. La nova prezidanto de la Akademio de Esperanto, William *Auld* honoras nian revuon per artikolo, kiu detale informas pri la laboro de nia plej grava lingva institucio. Bernard *Golden* lanĉas interesajn ideojn pri «Esperanto kaj magnetofono».

Poeziamantoj certe ne plendos: ni presigas specimene manplene da tre belaj Kalocsay-tradukoj, el la giganta kolekto «Tutmonda Sonoro», kiu aperos iam en oktobro. Kaj kompreneble, restis loko ankaŭ por la originala poezio. Por ŝatantoj de la originala prozo vera frandaĵo: fragmento el la romano «Kiuj semas plorante...», gajninta la prestiĝan Schwartz-premion.

La konstantajn rubrikojn oni retrovas en sia kutima loko, krom la krucenigmon, kiu pro iuj redakciaj problemoj povos regule aperi nur ekde la venonta numero. Ni esperas reordigi la kaoson ankaŭ koncerne la aperigon de la solvoj kaj la nomo de la gajnintoj.

En la pasinta jaro niaj abonantoj multe ĝeniĝis pro la neakurata aperado de nia revuo, kaj fakte la lasta numero el 1980 aperis nur antaŭ du semajnoj. Ni esperas, ke tiu ĉi numero malgraŭ ĉiuj malhelpoj povos eliri fine de marto, kaj la partoprenantoj de la Delegitara Kunveno de HEA povos legi ĝin. Se estos tiel, la laboristoj de la presejo en Székesfehérvár meritos nian profundan dankon pro la rapida kaj akurata laboro. En tiu ĉi jaro do viajn (mal)bondezirojn koncerne nian aperritmon bonvolu adresi ne nur al la Redakcio, sed ankaŭ al niaj amikoj-presistoj en Székesfehérvár.

KOSMONAŬTO KAJ ESPERANTO

Interparolo kun Bertalan Farkas, la unua hungara kosmonaŭto

Bertalan Farkas kun sia filineto

– *Ne koleru, ke ĉi tiun konversacion ni povas okazigi nur nun, sed ankaŭ vi scias, ke la spacveturo estas komplika afero. Kompreneble la populareco kaj pri ĝi la diversaj, eĉ nuntempe okazantaj, programoj estas por ni multe pli granda tasko, ol la daŭra senpezeco en la kosmo.*

Tiel komenciĝis la konversacio kun Bertalan Farkas en lia nova laborejo en la Ministerio de Defendo. Li akceptis kun ĝojo la peton de nia redakcio por paroli iom pri Esperanto, ja li havas malnovajn interrilatojn kun la Internacia Lingvo. Por klarigi la situacion, mi devas rakonti, ke tiu ĉi interparolo okazis post strangaj „historiaj antaŭaĵoj". Ni konas jam unu la alian de pli ol 15 jaroj. Ni lernis en la sama klaso en la lernejo de ĉaspilotoj en Hungario, kaj poste en Sovetunio. Fininte ĝin, ni aviadis kune ĉe la sama milita unuo, de kie la vojo de Bertalan kondukis al Stela Urbeto, kaj de tie en la kosmon. Pro tiaj kialoj mi ne povas fari kun li regulan intervjuon. Tio, kion mi povas fari, estas nur amika interparolo.

– Mi scias, ke vi lernis Esperanton, sed la publika opinio ankoraŭ ne scias pri tio ĉi.

– *Jes, mi lernis ĝin.*

– Imagu, ke mi nur faris mencion pri Esperanto kaj vi, du tagojn poste revenis al mi la rakonto en la formo: „Vetinte je kesto da biero li ellernis Esperanton".

– *Kesto da biero sonas sufiĉe bonhumore* – li diras ridante – *sed vi mem scias, ke mia lernado havis aliajn kialojn. Certe ankaŭ vi memoras ankoraŭ, kiel ĝi komenciĝis. Ni nur ŝercis pri vi, vidante, ke post la lacigaj aviadoj vi havis ankoraŭ energion por okupiĝi pri Esperanto kaj verki faklaborafon. Kiam vi proponis al ni lerni Esperanton, kaj ni konsentis, ankaŭ mi komprenis, ke ĝi ne estas ŝerco, sed io multe pli valora. Poste kompreneble mi volonte vetis kun vi kaj „ŝajne" pro duobla porcio da torto mi entreprenis en difinita tempo fari ekzamenon pri la Internacia Lingvo. Jen estas do la kialo...*

Laŭ la vortoj de Bertalan Farkas reviviĝas la kune pasigitaj jaroj, la neforgesebla ekzameno pri Esperanto, kaj multaj aliaj eventoj de la kunestado. Mi apenaŭ povas konvinki lin por reveni al la nuntempo kiam, estante porokaza raportisto mi demandas lin, kaj li respondas kiel la unua kosmonaŭto de la Hungara Popolrespubliko.

– Kio estas via opinio pri la Internacia Lingvo?

– *Mi estas konvinkita, ke oni bezonas la Internacian Lingvon. Se iu scias aŭ parolas en pluraj lingvoj, konas la originon de la vortoj, povas klare vidi, ke eĉ el tia vidpunkto Esperanto estas bonega lingvo. Ĝi faciligas eĉ la lernadon de aliaj lingvoj kaj pri tio ĉi ankaŭ ni konvinkiĝis, dumtempe ja iu el ni lernis la latinan, alia la francan, anglan aŭ germanan lingvojn. Ni vidis la parencecon de la lingvoj, ni povis kompari ilin kaj Esperanton.*

– Kiun lingvon vi lernis en tiu tempo?

– *La latinan kaj la anglan. La rusan mi ne mencias, ankaŭ vi scias, ke ĉiujn novajn konojn en la tereno de aviado ni akiris per la rusa lingvo.*

– Kaj Esperanto? Kial vi lernis ĝin?

– *Tial, ĉar en ĝi estas perspektivo, ĉar ĝi helpas ankaŭ en la lernado de aliaj lingvoj. Kaptis min la simpleco de tiu ĉi lingvo, la logikeco de la gramatiko. Esperanto estas unu el la plej grandiozaj inventafojen la mondo.*

– Post la kosma aviado okazis ŝanĝiĝo en via vivo. Vi fariĝis kosmonaŭto-esploristo, specialisto en kosmaj aferoj. Ĉu okazis ia ŝanĝiĝo en viaj interrilatoj kun la Internacia Lingvo?

– *Iom mi forgesis ĝin, ja ni havis en Stela Urbeto abunde da lernendafoj, kaj ankaŭ tio estas fakto, ke pasis jam iom da jaroj depost la tempo, kiam ni interparoladis Esperante, sed intertempe mi malkovris ion tute interesan.*

– Ĉu rilate al Esperanto?

– *Jes.*

– Ne forgesu ĝin, sed permesu al mi unue demandi: kiel longe vi lernis ruse?

– *Almenaŭ 15 aŭ 16 jarojn.*

– Tio estas ege longa tempo, sed la rusan lingvon ankaŭ mi lernis dum 13 jaroj. Mi scias, ke tiom da tempo kaj energio jam ebligas sufiĉe bone alproprigi fremdan lingvon. Mi scias, ke vi bonege parolas ruse, do mi demandas: ĉu vi havis malagrablajn miskomprenojn, parolante en fremda lingvo?

– *Jes, okazis al mi ankaŭ tiafoj. Estas ege malagrable, se oni demandas vin fremdlingve, kaj vi ne povas interkompreniĝi eĉ tiam, se vi bone parolas en unu aŭ du fremdaj lingvoj. Tiam nevidebla muro disigas vin de la demandinto, kaj tio estas terura.*

– Laŭ viaj spertoj kiel vi opinias pri la nuntempa lingva situacio de la kosmonaŭtiko? Ĉu ekzistas lingvaj problemoj en la kosma esplorado?

– *Tio ĉi estas malfacila temo! Mi devas al vi diri, ke estas tiaj problemoj. Bedaŭrinde! Temas pri tio, ke la alilandaj kosmonaŭtoj-kandidatoj ne parolas la rusan lingvon en la sama nivelo. Tio estas unu el la malfacilafoj kies forigo bezonas multan tempon. Ekzemple la estontaj francaj kosmonaŭtoj – kiuj faros viziton en la kosmo per soveta kosmoŝipo – ne scias ruse. Unue oni devos instrui al*

La kosmonaŭtoj vizitis la internacian pionir-urbon en Zánka apud Balatono

Honorigo de la kosmonaŭtoj en la hungara Parlamentejo. De maldekstre B. Magyari, A. Jelisev surtera komandanto de la spacveturado, B. Farkas kaj V. Kubasov, komandanto de Sojuz-36

ili la rusan lingvon dum longa tempo. Tio estas ĉiamaniere perdo de tempo kaj forpreno de energio, kaj malutilas al la konkreta laboro. La alia problemo estas tio, ke la lingvaĵo de la kosmonaŭtiko estas ege malfacila. Multege da mallongigoj, maro da specialaj esprimoj kaj vortkunmetoj estas en tiu ĉi faklingvo, kio kaŭzas problemojn eĉ por bonaj parolantoj de la rusa lingvo.

– Kio okazos en la futuro, kiam la programo Interkosmo plivastiĝos, kaj pli kaj pli novaj landoj aliĝos al la kosma esplorado? Kiel vi imagas la lingvan estonton de la kosmonaŭtiko?

– En socialisma rilato la uzado de la rusa lingvo fariĝos pli larĝa. Por sukcese kunlabori en kosmaj terenoj, la partoprenontoj devos ellerni la rusan lingvon. En la kazo de la alia kosma potenco, en tiu de Usono, la sama fenomeno estas videbla. Ankaŭ tie elformiĝas tielnomata kosma lingvaĵo, kiel en la rusa lingvo. Paralele kun tiuj ĉi tendencoj ekestas la kosma lingvaĵo ankaŭ en la aliaj naciaj lingvoj. Tio okazas ankaŭ en la hungara lingvo. Mi scias, ke tio estas grandega perdo de energio, kaj ĝuste tio estas, kion mi volis diri antaŭe.

– Mi jam preparis min por memorigi vin...

– Do, mi ne scias, ĉu vi konsentas aŭ ne, sed laŭ mia opinio la Babela konfuzo de lingvoj nun komencas fariĝi grava malhelpo en la vojo de la kunagado. En la futuro ĝi nur plifortiĝos. La situacio estas vere komplika. Oni nun devus ekuzi tian mondlingvon pri kiu ni jam tiel multe parolis.

– Certe vi pensas pri Esperanto?

– Jes, sed vi mem diris iam, ke la perfektigo de la teknika lingvo en Esperanto ne apartenas al la facile realigeblaj procesoj.

– Jes, vi pravas. Vere, mi parolis pri tio, sed la sama afero koncernas ĉiujn lingvojn, kaj mi havis en la penso la politikajn ŝanĝiĝojn okazantajn en la mondo. Bedaŭrinde, la homaro havas ankoraŭ multajn gravajn problemojn sur tiu ĉi planedo, kiu el la kosmo aspektas admirinda. Uzante viajn vortojn „ĝi estas tiel admirinda, ke ruse mi eĉ ne scias rakonti." La Babela lingvokonfuzo de tie jam ne estas videbla, sed estas fakto ke la konkero de la kosmo bezonas internacian kunagadon kaj unuiĝon. En la futuro ni devos kalkuli pri tio, ke Esperanto ekuziĝos sur la terenoj de la sciencoj, kaj iom post iom ĝi fariĝos produktilo. Kiel vi opinias? Ĉu Esperanto estus utiligebla en la farotaj kosmaj esploroj?

– Mi pensas, ke jes. Se oni sukcesos krei unuecan kosman terminologion. Tio siavice dependas de tio, kiam oni sukcesos akceptigi Esperanton kiel ĝeneealan interŝtatan helplingvon. Praktike la kreado de unueca kosma terminologio ne havas seriozajn malhelpojn eĉ hodiaŭ. Espereble la homoj baldaŭ komprenos, ke la mondo bezonas lingvon, kiu estas rapide ellernebla, kaj kiu povas fariĝi neŭtrala ilo de interkompreniĝo en la internaciaj rilatoj.

– Mi konsentas kun vi, sed ni revenu al la farendaĵoj de la nuntempo. Ĉu vi povus diri ion pri viaj pluaj planoj?

– Paralele kun la prilaboro de la materialo de la kosma aviado kune kun mia amiko kaj kolego, Béla Magyari ni preparas nin por komenci niajn studojn en la teknika universitato. Kompreneble ni respondas ankaŭ je tiuj multaj leteroj, kiujn ni ricevis.

– Ĉu vi lernas ankaŭ lingvon?

– Jes! Mi decidis, ke mi refreŝigos miajn esperantlingvajn konojn, kaj denove eklernos la anglan. Mi volas atingi la nivelon de konversacio dum mallonga tempo, kaj estus bone legi la okcidentan fakliteraturon en originalo. Lastfoje mi partoprenis en konferenco, kie oni parolis angle. Multe mi ne komprenis... do mi devas lerni ankaŭ la anglan lingvon.

– Ĉu vi pensas, ke ellernonte la anglan lingvon almenaŭ tiel bone kiel la rusan, vi ne havos problemojn en lingvaj terenoj?

– Mi timas, ke mi havos tiujn ankaŭ plu... En la nuntempa mondo koni du fremdajn lingvojn ne plu sufiĉas. Tial mi ŝatas Esperanton, kaj tial mi apogas ĝin. Tiu ĉi konvinkiĝo post la kosmoveturo nur plifortiĝis en mi.

– Mi deziras al vi, ke ĝi fortiĝu plu kaj, ke ankaŭ aliaj kosmonaŭtoj sekvu vian ekzemplon. Permesu al mi ankoraŭ unu demandon: Kion vi volus diri al la esperantistoj kiuj opinias vin la unua esperantista kosmonaŭto de la mondo?

– Esperanto estas unu el la plej grandiozaj elpensaĵoj en la mondo. Ĝi havas perspektivojn. Valoras lerni ĝin.

– Dankon pro la konversacio.

Jozefo *Horváth*

Márton Lengyel

vicprezidanto de la Hungarlanda Turisma Oficejo

Kion povas fari turistoj por la interkompreniĝo?

Partoprenantoj de Semajno de Internacia Amikeco sub la Televida Turo de Pécs

Inter la pluraj centmilionoj da turistoj, veturantaj eksterlanden, certe malmultaj estas, kiuj dumvojaĝe ne sentis sin fremdaj, perditaj, ĉar ili ne kapablis komprenigi sin kaj ankaŭ ili mem ne komprenis la tieulojn. Tiamaniere, krom la suprajaj travivajoj, restus nura revo la interŝanĝo de pensoj, nepre necesa por la pliproksimiĝo de la homoj, eĉ, ankaŭ kontentigo de elementaj bezonoj ofte renkontos barojn lingvajn. La plej grava kuniga ilo de la homaj rilatoj, la lingvo ankaŭ nuntempe ofte disigas. En la epoko de la moderna evoluinta tekniko de la amaskomunikado kaj en tiu de la amasa turismo oni komprenas unu la aliajn ne sufiĉe kaj en la plej granda parto de la kazoj tute ne.

En la 210 landoj de la Tero ekzistas 84 oficiale uzataj lingvoj, sed la kvanto de la parolataj lingvoj estas 2800. Aliflanke, en la internaciaj rilatoj nur 8-10 lingvoj ludas gvidan rolon, en la internaciaj organizoj eĉ pli malmulte, ja la kvanto de la tie uzataj lingvoj ne superas 4-5.

Estas pli ol du kaj duonmilo da nacioj, kiuj ne povas uzi sian gepatran lingvon en la internaciaj rilatoj kaj nur helpe de iu pera lingvo ili povas ekhavi informojn por riĉigi sian kulturon, dum la anoj de la nacioj kun tiel nomataj „mondlingvoj" rajtas paroli sian denaskan idiomon internaciaskale.Tiu ĉi situacio por la grandega plimulto de la popoloj signifas gravegajn malavantaĝojn materian kaj spiritan. La multlingveco estas grandega ŝarĝo ankaŭ por la internaciaj organizoj: la monsumoj elspezitaj por tradukado, interpretado kaj dokumentado ofte faras pli ol kvaronon de ilia buĝeto.

La malfacilajoj de la multlingveco povus esti ĉesigitaj ĝuste per la universala uzado de unu dua lingvo apud la gepatra de ĉiu.

La eblo de la solvado jam ekzistas, nome la internacia lingvo Esperanto, kiun el la vivantaj lingvoj evoluigis d-ro L.L.Zamenhof. Laŭ science pruvitaj spertoj kvinoble pli rapide kaj facile eblas ellerni Esperanton, ol aliajn idiomojn.

Estas pripensige, ke la granda verkisto franca, Romain *Rolland* konsideris neimagebla la internacian komunikadon sen la uzado de Esperanto. UNESKO jam en sia Asembleo Montevidea en 1954 per aparta decido rekonis akirajojn de Esperanto en la kampo de la internaciaj rilatoj kaj en la proksimigo de la popoloj. La ĝenerala direktoro de tiu organizo dum la 62-a Universala Kongreso de Esperanto, (1977, Rejkjaviko) akcentis, ke ankaŭ UNESKO devas okupiĝi pri la rajto de la sendiskriminacia lingvouzo, grava por ĉiu. La Mondfederacio de UN-Asocioj (WFUNA) dum sia 27-a Kunsido (en oktobro de 1979) ankaŭ tagordigis la problemon de Esperanto. La 27-a plena kunsido de WFUNA atentigis ĉiun UN-Asocion pri la kunlaborado kun la Esperanto-Asocioj kaj pri la stimulado de la edukaj organizoj de la respektivaj landoj por ekinstrui Esperanton, aŭ plivastigi la jam ekzistantan Esperanto-instruadon. Kiel apoganton de Esperanto, mi povas nomi ankaŭ sinjoron Robert C. *Lonati*, ĝeneralan sekretarion de Mondorganizo pri Turismo (WTO). Dum la 7-a kunsido de la Eŭropa Regiona Komitato de la Organizo, laŭ la alvoko pri la popularigo de Esperanto en la turismo li sugestis al mi verki la jenan artikolon. Nuntempe homoj, depende de sia libertempo, kelkajn tagojn aŭ semajnojn povas esti turistoj. La evoluo socia-ekonomia estas akompanata de kresko de la libertempo kaj tiu de la enspezoj, tiel la stato turista por pli kaj pli grandaj homamasoj fariĝas atingebla kaj kutima. La homo de la futuro (laŭ la esprimo de la iama franca turisma gvidanto J–P.Dannaud „homo turisticus") en pli kaj pli granda mezuro partoprenos la turismon, renkontos aliajn popolojn kaj lingvojn, sed ankaŭ dum la laboro pli kaj pli ofte bezonas fremdlingvajn informojn. Tial ankaŭ la mondskala disvolviĝo de la turismo urĝigas la problemon de la plejeble vasta utiligo de la Internacia Lingvo.

La mondorganizo Turisma (OMT) prognozas 3 miliardojn da turistoj ĝis 2000. La specialistoj pri turismo atendas, ke ĝis tiu tempo la turismo ne nur iĝos unu el la ĉefaj brancoj de la ekonomio, sed ankaŭ ke disvastiĝos ĝiaj roloj politika, socia, kultura kaj eduka; laŭ tio ĝi okupos sian indan lokon inter la faktoroj difinintaj la kvaliton de la homa vivo, la interkompreniĝon de la popoloj. Laŭ la iniciato de OMT en septembro de 1980 en Manila kunsidos Mondkonferenco de Turismo. Ĝia plej grava celo estos difini tiun ĉi multflankan rolon de la turis-

mo. La Mondkonferenco estos la plej grava aktivado de OMT por futuro de la turismo. Alvoko kaj sugesto fare de la konferenco grave helpus disvastigon de la lerneja instruado de Esperanto tutmonde, kio estas la baza kondiĉo por tio, ke nia epoko pere de la Internacia Lingvo vere iĝu epoko de la komunikado*. La membroj de OMT povus montri bonan ekzemplon kaj helpi kaj stimuli la instruadon de Esperanto inter la laborantoj de la turismo kaj inter la turistoj.

* Tiu ĉi artikolo verkiĝis antaŭ la konferenco en Manila. Tie la aŭtoro de tiu ĉi artikolo, kiu cetere mem ellernis Esperanton, kiel membro de la hungara delegacio prezentis al la konferenco proponon favoran al la Internacia Lingvo, dank' al kiu propono ankaŭ en la fina dokumento aperas rekomendo akceli la disvastigon de Esperanto en turismaj sferoj.

Internacia turista grupo ĉe la bulgara marbordo

Internaciaj Esperanto-aranĝoj en Hungario dum 1981

1. 04–04/06
Szombathely
JUNULARA ESPERANTO-RENKONTO (JER)
O: Junulara Komisiono de HEA
A: Budapest, Pf. 193. H–1368
Ad: 1981–03–01

2. 05–15/17
Börzsöny–Zebegény
ZAMENHOF INTERNACIA PACMARŜO (ZIP)
O: Budapeŝta Komitato de HEA
Departementa Komitato de HEA (Pest)
Turisma Komisiono de HEA
A: Budapeŝta Komitato de HEA
Budapest, Pf. 153, H–1443
K: 200,– forintoj
Ad: 1981–04–15

3. 06–22/28
Loko decidota
MEZLERNEJA RIPOZTENDARO (MER)
O: Junulara Komisiono de HEA
A: Budapest, Pf. 193, H–1368
Ad: 1981–05–15

4. 07–05/11
Gyula
19-a SOMERA ESPERANTO-UNIVERSITATO (SEU)
O: Konsilantaro de SEU
A: Gyula, 48-as u. 11. H–5700
K: 1600–2000 forintoj
A: 1981–06–01

5. 07
Zánka
14-a PIONIRA INTERNACIA TENDARO (PIT)
O: Teritoria Komitato de HEA
A: Pécs, Pf. 2. H–7601

6. 07–20/29
Abaliget
14-a INTERNACIA RENKONTO NATURAMIKA (IREN)
O: Pécs, Pf. 2. H–7601
K: 1750–2500 forintoj
Ad: 1981–06–20

7. 08–02/13
Eger
SOMERA ESPERANTO-LERNEJO EN EGER (SELE)
O: Departementa Komitato de HEA (Heves)
A: Eger, Pf. 105. H–3301
K: 2600,– forintoj
Ad: 1981–07–01

8. 12–28/1982–01/02
Budapest
11-a VINTRA ESPERANTISTA FERIO (VEF)
O: Budapeŝta Komitato de HEA
A: Budapest, Pf. 153. H–1443
K: 2300,– forintoj
Ad: 1981–11–10



NÉPMŰVÉSZETI·ÉS·HÁZIIPARI·VÁLLALAT·

Ĉiuj pecoj majstroverkoj troveblas en 80 vendejoj!



Hungaraj popolartaĵoj por memoro, por donaco

Servo por klientoj: 184–697
Popolarta kaj Hejmindustria Entrepreno

William Auld

KIO ESTAS LA AKADEMIO DE ESPERANTO?

Probable ĉiuj esperantistoj aŭdis pri la Akademio. Sed oni povas konjekti, ke al tre multaj el ili tiu institucio estas io nekonata, nepreciza, svaga. Kio ĝi estas? Kiuj estas akademianoj? Kion ĝi faras?

Al la unua demando respondas artikolo 1 de la akademia statuto: *„La Akademio de Esperanto estas sendependa lingva institucio, kies tasko estas konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon."* Kion tio praktike signifas, ni vidos poste. La nombro de la akademianoj estas „principe 45" – aktuale reprezentantaj 18 diversajn nacilingvojn. Ili elektiĝas por periodoj de naŭ jaroj, kaj ĉiun trian jaron unu triono estas elektata. La membroj de la Akademio estas elektataj de la Akademio mem.

„Kiel membroj de la Akademio estas elekteblaj la esperantistoj, kies kapabloj kaj agado sur la tereno de la Lingvo Internacia garantias ilian kompetentan partoprenon en la laboroj de la Akademio" (art. 2). *„Por fariĝi kandidato por la Akademio, esperantisto devas esti proponita de almenaŭ 5 Akademianoj, kiuj reprezentu almenaŭ tri malsamajn naciajn lingvojn".* (art.8).

Ne ĉiam estis tiel. Ĝis 1964, kandidatojn povis proponi ĉiu unuopa esperantisto, kiu ankaŭ povis proponi sin mem! Tiu rajto, ne mirinde, kaŭzis grandajn malfacilaĵojn; ofte tiel dividiĝis la voĉoj, ke oni devis refari la balotojn, kaj multaj estis elektitaj aŭ rifuzitaj per unu sola voĉo. La nova maniero montriĝis multe pli praktika kaj kontentiga.

Eble ni nun rigardu iom la historion de la institucio. La Unua Kongreso en Bulonjo (1905) starigis Lingvan Komitaton, kiu konsistis el 102 membroj el 26 nacioj. Sed montriĝis, ke tiel multnombra kaj disvastigita komitato ne povis labori en la praktiko, kaj tial en 1908 la Kvara Kongreso decidis formi ankaŭ Superan Komision non aŭ Akademion el maksimume 18 membroj, kun la sama Estraro kiel la Lingva Komitato. Samtempe oni starigis kvar konstantajn komisionojn por Komuna Vortaro, Gramatiko, Teĥnika Vortaro, kaj Internaj Aferoj. La tasko de la L.K. estis: *„zorgi pri la konservado de la fundamentaj principoj de la lingvo kaj kontroli ĝian evolucion."* En 1935 la nombro de la L.K.-anoj limiĝis je cent.

Do en la jaroj antaŭ la Dua Mondmilito la Akademio estis la supera komisiono de la Lingva Komitato. Dum tiu periodo la Prezidantoj (de ambaŭ lingvaj institucioj) estis: 1905–1917, Emile Boirac; 1920–1931, Théophile Cart; 1931–1933, John Mabon Warden; 1933–1937, Maurice Rollet de Lisle; 1937–1939, Johannes R. C. Isbrucker.

Post tiu milito la Prezidanto sukcesis kontaktiĝi kun nur 48 el la antaŭmilita Lingva Komitato, kaj tial li trovis la okazon matura por funde reformi la institucion kaj forigi ĝian ĝenan duoblecon. Malaperis la Lingva Komitato, kaj restis nur la Akademio de Esperanto. La nova statuto tamen montriĝis neoportuna diversrilate, do kiam en 1963 Gaston Waringhien transprenis de Isbrucker la prezidantecon, la Akademio akceptis novan statuton, ĝis hodiaŭ validan. En 1979 Waringhien rifuzis pro motivoj de aĝo, reelektiĝi kiel prezidanto, kaj William Auld estis elektita.

Oficialaj publikigaĵoj de la Lingva Komitato inter 1908 kaj 1939 estis nur ses Oficialaj Aldonoj al la Universala Vortaro (1909, 1919, 1921, 1929, 1934, 1935), kaj kvin partoj de la „Korektoj pri eraraj tradukoj en la Universala Vortaro" (1922–23). De 1948 ĝis 1963 la Akademio oficialigis la sufikson **-end**, eldonis la sepan Oficialan Aldonon al la U.V. (1958), kaj oficialigis malgrandan parton de „Listo de la oficialaj vort-elementoj".

Sub la prezidanteco de Waringhien la laboro de la Akademio multe viglĝis. La laboron faras ĝenerale unu el la „Sekcioj" (Ĝenerala vortaro, gramatiko, Teĥnikaj vortaroj, Bibliografio ktp) gvidataj de diversaj akademianoj. Sekcio povas proponi siajn konkludojn al la tuta Akademio, kiu eventuale voĉdonos pri ili. Inter 1963 kaj 1967 du ĉefaj aferoj okupis la atenton de la institucio: la signifo de la pasivaj participioj (sub gvido de la Gramatika Sekcio), kaj la problemoj de la vortfarado (sub gvido de la Sekcio Ĝenerala Vortaro). Pri ambaŭ demandoj la Akademio publikigis rekomendojn.

Post 1968 la Akademio publikigis la okan Oficialan aldonon al la U.V., kiu interalie oficialigis diversajn landnomojn kaj landano-nomojn kaj nuligis siatempan malrekomendon de la sufikso **-io**. Ĝi poste turnis sian atenton al *Baza Radikaro Oficiala.*

Tiu lasta grava eldonaĵo eble ne ricevis la meritatan atenton. Ĝi devenas de la koncepto pri „komuna vortprovizo", kiun disvastigu ĉiuj lernolibroj de la mondo. En „Lingvo stilo formo" Kalocsay difinis la aferon jene:

„Devas ekzisti limita vortprovizo, *la trunko* de la lingvo. Ĉiu, kiu volas uzi la lingvon nur por ĉiutagaj bezonoj devas koni ĉi tiun lingvo-trunkon, sed ne bezonas nepre koni pli multe. Ĉiu, kiu volas esti certa pri tio, ke oni lin komprenas, devas uzi nur ĉi tiun trunkan vortprovizon, alie li riskas miskomprenon. Sekve, ĉiuj lernolibroj devas enhavi ĉi tiun vortprovizon, sed nenion pli."

La Akademio do, sub gvido de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro, ellaboris tiun Bazan Radikaron surbaze de vort-ofteco. Ĝi konsistas el naŭ grupoj da vortoj (en ordo de ofteco), kiuj sume donas vortprovizon (respektive radikaron kun elementoj) de 2.460 elementoj. Espereble niaj lernolibroj iom post iom alprenos tiun bazan radikaron. La nuna aŭtoro konstruis sian libron *„A first course in Esperanto"* surbaze de nur la du unuaj grupoj de la Radikaro.

Du aliaj *„Rekomendoj de la Akademio"* aperis antaŭ 1974: pri la refleksivo, kaj pri la vorto „po".

Kiel oni povas laborigi la Akademion? Tion difinas la art. 13 de la Statuto: La Akademio devas esplori demandojn, prezentitajn al ĝi de unu el la sekvantaj instancoj: a) la Prezidanto aŭ la Estraro; b) la Direktoro de unu el la Sekcioj; c) almenaŭ 5 Akademianoj. La Akademio povas ankaŭ esplori demandojn prezentitajn al ĝi de iu esperantista organizaĵo, de unuopa persono aŭ de grupo da personoj.

La elspezoj de la Akademio estas kovritaj per konstanta subvencio de UEA, per oftaj subvencioj de SAT, kaj per okazaj subvencioj de unuopaj Landaj Asocioj.

La aŭtoritato de la Akademio estas nur morala. Sed ĝia ekzisto garantias centran voĉon pri lingvaj aferoj kaj specon de kortumo, al kiu povas sin turni la esperantistaro aŭ eĉ unuopaj esperantistoj por rekomendoj aŭ konsiloj pri la lingvo. Ĝia tasko ne estas evoluigi la lingvon, sed kontroli ties evoluon surbaze de rigora fidelo al la Fundamento.



TUTMONDA SONORO

En la numero 5/1980 de HV ni aperigis informojn pri la komenco de la redaktaj laboroj super la giganta tradukantologio de Kalocsay, super *Tutmonda Sonoro.*

Intertempe la laboroj daŭris bonritme, kaj ankaŭ ampleksiĝis la materialo, ĉar klariĝis, ke profesoro *Waringhien* gardas amason da Kalocsay–tradukaĵoj, ĝis nun neeldonitaj. Li afable disponigis al ni tiujn manuskriptojn, kaj tiamaniere *Tutmonda Sonoro* komencas ekhavi siajn finfinajn konturojn: ĝi enhavos inter 17–18 000 versojn, t.e. 581 poemojn de 185 poetoj, verkintaj entute en 30 lingvoj.

La akompana bildo ankoraŭ ne prezentas realan scenon: ĝi estas fotista lertaĵo. Ni tamen esperas, ke la volumo povos eliri dum la frua aŭtuno, por inde festi la 90-an naskiĝtagon de Kalocsay, la 6-an de oktobro.

La subaj poemoj deziras iom sentigi la variecon de la enhavo de tiu ĉi duvoluma, ĉ. 700-paĝa, fortike bindota verkego, kies prezo estos 66,– gld (por Hungario ĉ. 325,– forintoj, por Sovetio ĉ. 20,– rubloj).

(V.B.)

Dante:

Soneto

Aspektas tiel digna kaj ĝentila
ŝi, mia Dam', se iun ŝi salutas,
ke ĉiu lango tremas kaj ekmutas,
l' okuloj klinas sin en tim' humila.

Aŭdante laŭdojn, iras ŝi, trankvila,
humilvestita tute. Ŝi kondutas
tiel, ke ŝajnas: la ĉielo ŝutas
alŝtero ravon por miraklo brila.

Tiel ŝi ĉarmas ĉiun alrigarde,
al kor' donante dolĉon tra okuloj,
ke tion scias sole, kiu provas.

Kaj ŝajnas, ke tra ŝia buŝ' sin movas
tenera spiro plena de ambruloj,
diranta al l' anim': Suspiru arde.

(El la itala)

Babelo

Kaj unu lingvo estis sur la ter'
kaj unu maniero de parolo.

Kaj ili, ekirinte el la Orient'
ebenon trovis en la lando Ŝinar
kaj tie ili loksidiĝis.

Kaj diris unuj al aliaj: „Venu do,
ni formu brikojn kaj bruligu fajre."
Kaj estis brik' al ili kiel ŝtono
kaj estis peĉ' al ili kiel kalko.

Kaj ili diris: „Venu do,
nun ni konstruu por ni urbon,
kaj turon, kies pint' atingos la ĉielon,
kaj ni akiru por ni nomon,
por ne disiĝi sur la tuta tersupraĵ'.

Kaj jen descendis Jahve,
por vidi tiun urbon kaj la turon,
kiujn konstruis la homidoj.
Kaj diris Jahve: „Jen do, unu la popol',
kaj ili ĉiuj havas unu lingvon,
kaj jen do, kion ili nun komencis,
kaj ili plu ne estos malhelpataj
plenumi ĉion deciditan.
Nu, ni descendu do
kaj ni konfuzu ilian lingvon,
ke unu la alian ne kompreenu."

Kaj Jahve do de tie
disigis ilin sur la tuta tersupraĵ',
kaj ĉesis la konstruo de la urbo.

Kaj tial oni nomas ĝin Babelo,
ĉar tie ja konfuzis Jahve
la lingvon de la tuta ter',
kaj ĉar de tie Jahve
disigis ilin sur la tuta tersupraĵ'.

(El la hebrea)

Ivan Vazov:

Amo necesas

Tre honorindaj estas: la indigno,
pri ĉiu hom' la severjuĝa voĉ',
vortvipoj flamaj kun kolera digno
pri mankoj, kulpoj, malvirtaĵ', diboĉ'.

Kaj bone estas: vipi la jarcenton,
pri l' kulpa mondo esti akuzist',
insultojn galajn ĵeti sur homgenton,
ripetadatajn ekde l' mondekzist'.

Sed jen plibono, tamen frato mia,
ol la kolero nobla kaj furor',
ĝi estas amo: heroaĵo dia,
tre malfacila nun, sed granda glor'.

Ĉar ami estas scii pekpardoni,
kaj scii: estas granda pov' en ni,
ĉar ami estas: kun kuraĝ' rekoni:
ni pekas, kiel ĉiuj, se ne pli.

Kaj kredi: venkos Dio lumosage
en kompatinda homa korprofund',
ne vorte lukti kun Malbon', sed age,
balzame veni, ne kun vip' al vund'.

Juĝvortojn ĉiu, eĉ krimulo trovas,
la mond', jen, plenas de malama bru'.
Amo necesas al ni, nur ĝi povas
ekteni sanktan krucon de Jesu'.

(El la bulgara)

Jaroslav Vrchlický:
Iluzio

La ĉambro plenis. Dum ĝin trarapidis
mia rigard', knabinon mi ekvidis,
ŝi turnis sin al notoj ĉe l' pian',
apogis kapon reve en la man'.
Nur riĉajn buklojn vidis mi, kaj trude
ili min logis: ŝin imagi tute:
ovalon mildan de l' infan-vizaĝ'
ĉe l' lumo de l' unua revmiraĝ',
lip-fragojn ĉastajn, kun la freŝ' purpura,
la frunton, kie fluis paco pura,
kiel la luna lumo sur marmor' –
kaj plue revis mi pri ŝia kor',
pri la sopir' de l' maturiĝaj jaroj –
ĉion ĉi legis mi de ŝiaj haroj.
Jam preskaŭ pentre mi prezentis ŝin,
sed jen, subite tim' turmentis min,
ke ĉi sonĝita tuta mond' etera
disfalos, kaj nun, kun rigard' surtera
mi fuĝis, kun la bild' en mia sin'.
Ho, iluzioj, antaŭ kiam vin
la viv' frakasas, kial ni ne mortas,
kaj vian helan brilon kun ni portas?
Jen, kun inspiro via sur la frunt'
la krucon sucas mi ĝis teda fund'.

(El la ĉeĥa)

E. A. Poe:
Annabel Lee

Antaŭ longe, jam longe, en la reĝland'
apud maro, tie ĉi,
knabinet' ĉe ni vivis (vi konis ŝin
laŭ la nom': Annabel Lee),
nur ĉi penso vivigis ŝin: ami min
kaj esti amata de mi.

Mi estis infan', ŝi estis infan'
apud maro, tie ĉi,
sed ni amis kun am' pli profunda ol am',
mi, kaj mia Annabel Lee,
eĉ serafoj flugilaj el nuboj nin
rigardis kun envi'.

Jen kaŭzo, ke antaŭ longa temp'
apud maro, tie ĉi,
ekventis el nub', malvarmumis
mia bela Annabel Lee,
parencoj ŝiaj altaj venis
kaj ŝin portis for de mi,
en tombon kuŝigante ŝin
apud maro, tie ĉi.

L' anĝeloj, ja malpli feliĉaj ĉiele,
nin rigardis kun envi',
ho jes, jen la kaŭzo (ja ĉiu ĝin scias
apud maro, tie ĉi),
ke la vento alvenis dum nokto el nub'
kun porto de morto al Annabel Lee.

Sed am' nia estis pli forta ol am'
de homoj pli aĝaj ol ni,
de multaj pli saĝaj ol ni,
kaj nek' la anĝeloj en alta ĉiel'
nek demonoj de l' marimperi'
malligos, disigos ĉi koron de l' koro
de la bela Annabel Lee.

Ĉar sonĝporte sin levas la Lun' kaj mi revas
pri la bela Annabel Lee,
kaj se levas sin stelo, mi revas pri l' helo
okula de Annabel Lee,
tiel dum la nokthoro mi kuŝas ĉe l' koro
de Ŝi: mia viv', fianĉino, trezoro,
en la eta tombar', tie ĉi,
en la tomb' apud mar', tie ĉi.

(El la angla)

A. S. Puŝkin:
La eĥo

Se fulmotondro, voĉ' fanfara,
besthurlo en la dens' arbara,
sur knabinlipoj kanto klara
al vi atingas,
vian respondan vorton, kara,
tuj vi resvingas.

Se la ĉielon tondro fendas,
se ŝtormo blekas, rokoj plendas,
se ŝalmo trilas, vi resendas
ĝin per ripeto.
Respondon vane vi atendas.
Kaj la poeto? ...

(El la rusa)

La laca soldato
(El „Ŝi-king")

Knabino kalva, planto senfolia
ĉe l' vojo staras. Kaj mi preterpasas.
Kaj tiel staras ĉiuj. Kap' ĉe kapo
kaj vico apud vic' amasas.

Kion mi scias jam pri l' akvoj sanktaj,
kaj pri l' vilaĝa vespermanĝo paca?
Per mil tranĉiloj estas mi pikita,
kaj de la multaj mortoj laca.

Infanokuloj kiel ora pluvo.
Kaj tas' da vino en ilia mano.
Mi volus kuŝi dorme sub la arboj
kaj plu ne esti armeano.

(El la ĉina)

SEKRETO DE BELA HAŬTO

Pelè

„La internacia sporto certe uzos Esperanton"

Péter Serényi intervjuis la famegan futbaliston en Budapeŝto

Kiu vi estas ververe? Ĉu filmstelo, eks-futbalstelo, eventuale negoculo, aŭ talentulo en ĉio?

– *Skribu simple: mi estas Pelé...*

Jen sinprezento, certe malpli regula ol gaja. Apud la Bulvardo Hungaria, en la malnova stadiono de la Klubo MTK–VM mi sukcesis renkonti la vere mondfaman futbaliston Brazilan dum filmado. Jes, li venis tien por labori kelkajn semajnojn: Usona filmfabriko ĉi tie produktas laŭdire grandiozan filmon „Fuĝo al la venko", kaj unu el la ĉefaj rolantoj estas Pelé. Ĉirkaŭe ĉio ŝajnigas la okupitan Parizon de la dua mondmilito: sur la herbo luktas la dekunuo de la okupanta nazi-armeo kun teamo de la kaptitaj aliancanoj... Franclingvaj afiŝoj, sed germanaj uniformoj de SS-uloj, maŝinpistoloj en mano de gardistoj kaj hokokrucoj ĉiudirekte ĝenas la rigardon.

En rondo de aŭtogrampetantoj Pelé afable subskribas, ĝis ni flankeniras por intervjuo. Anglalingve ni konversacias, tial mi tuŝas unue la lingvan demandon.

– Vere internacia estas tiu filmtrupo. Kiel do eblas komunikadi? – mi demandas, kaj almontras kelkiujn, la anglan kaj la polan futbalistojn, Bobby Moore kaj Kazimierz Deyna, Sylvester Stallone, Oskar–premiitan Usonan aktoron, la argentinan sportiston Ardiles kaj pluajn aliajn.

– *Ni parolas prefere angle, la plej multaj partoprenantoj konas tiun lingvon. Krome la reĝisoro, John Huston estas Usonano.*

– Se vi permesas, mi legas ion al vi. Antaŭ deko da jaroj vi deklaris en via libro *Mi estas Pelé:* „Ankaŭ inter sportistoj Esperanto estos la plej utila komunikilo, por akiri en la internacia sportado plian alproksimiĝon kaj facilan interamikiĝon." Kaj vi aldonis ankoraŭ, ke vi volas lerni Esperanton... Kio sekvis tiun planon? Kaj cetere, kio estas nun via opinio pri Esperanto?

– *Kion mi skribis en mia libro, kion mi tiutempe diris, estis serioze pensitaj, kaj ankaŭ nun mi samopinias. Laŭ mi Esperanto havas grandiozan futuron. Nun ankoraŭ ŝajnas al mi tro frue disvastigi ĝin tutmonde, tamen ne estas tre fora tiu tempo, kiam tute natura estos jam la uzado de Esperanto. Kaj ne nur en la sporto, kiel mi aŭguris iam, sed en ĉiuj sferoj de la komunikado, en la politiko, eĉ en la arta vivo. Probable iam ankaŭ la anoj de tia internacia filmtrupo per lingvo unusola interparolos...*

Pelé ravas min. Kiam mi lanĉis tiun temon, por li verŝajne nekutiman, mi kredis, ke li ne akceptos ĝin serioze. Plena eraro miaflanke, ja mi sentas ĉe li nenian embarason, eĉ male: liaj vortoj ŝajnas pripensitaj de homo interesiĝanta pri tiu temo, kaj parolanta laŭ vera konvinko.

Ni devas iom paŭzi: oni vokis lin por ke li donu konsilojn al scenigo de ia golsituacio, kie li tamen ne havas rolon. Mi rigardas lin pli bone: ĉi-jare li atingis la 40-an, sed tio ne videblas. Aktiva futbalisto li aspektas en la blanka kalsono, ruĝa ĉemizo – kvankam jam de pluraj jaroj li ne plu ludas.

– Laste vi ludis en Usona profesia futbal-klubo; tie, en internacia teamo, kiel okazis la interkompreniĝo?

– *Nu, en futballudo tio iras simple: la ludo estas ja internacia. Kiam ni interparolis, ni miksis la anglan kun la portugala, hispana, itala, eĉ kun la germana. Ĝuste tial necesas jam komuna lingvo! ... Kiel mi diris jam antaŭ dek jaroj, Esperanto servus bonege...*

– Ĉu vi lernas lingvojn facile?

– *Jes, kvazaŭ fluge, sen obstakloj. Tamen mi ne scipovas perfekte la anglan... aĉeti kaj manĝi mi kapablas... ja en Brazilo mi ne lernis lingvojn, la anglan nur dum miaj Usonaj jaroj, do lastatempe.*

Oni filmas golon, Stallone ne povas malhelpi ĝin, Pelé alkuras por kelkaj vortoj. Li estis nur dekjarulo, kiam li komencis en eta futbal-klubo Brazila, kie ankaŭ lia patro partoprenis. Lia mirinda talento rapide alportis la kromnomon Pelé, pro la „pelada", la pilko. En 1956 li ludas jam en la plej granda Brazila klubo, Santos, kaj nur 17-jara li partoprenas en la nacia teamo. Dum sia kariero li ŝotis pli ol 1200 golojn, kaj preskaŭ centfoje ludis en la elektita nacia teamo... Kaj nun li ludas la rolon de Usona militkaptito en faŝista germana tendaro...

– Kion vi faras, kiam vi ne filmas? – prezentiĝas mia intereso, kiam Pelé revenas de la golejo de Stallone.

– *Multe da afoj estas en mia posedo hejme, inter aliaj unu radiostacio. Dum mi vagadas en la mondo, miaj gepatroj kaj fratoj direktas ilin kun miaj amikoj.*

– Kiam vi iros hejmen?

– *Bedaŭrinde nur post longa tempo. Post plenumo de la Budapeŝta filmado mi flugos al Usono por alia filmado, en kiu mi instruos infanojn.*

En lia tono sentiĝas vera bedaŭro... Pelé pensas je sia familio, je siaj etaj infanoj... Sed mi devas fini. Kaj Pelé afable subskribas por la esperantistoj malnovan numeron de *Eszperantó Magazin*, sur kies kovrilo aperis lia foto, kaj kun rideto li manpremas adiaŭante.

Tradukis: E. *Fenyvesi*

Eksterlando por Eŭropanoj



Kasteloj en Nagoja

– *Tri semajnoj en Japanio* –

Ne la unuan fojon mi paŝis sur la grundon de alia lando, kiam post 12 000 kilometra vojaĝo per aviadilo, trajno kaj ŝipo, finfine mi troviĝis en la haveno de la japana urbo Jokohamo. Tamen, la postaj tagoj kaj semajnoj montris, ke miaj ĝisnunaj vojaĝoj en Eŭropo, de Hispanio ĝis Finnlando, de Grekio ĝis Nederlando estis kvazaŭ simplaj promenoj tra najbaraj kvartaloj de la propra urbo. Japanio estas io alia. Ne nur pro la lingvo kaj la skribo, komplete enigmaj por mi, ne nur pro la nekutimaj manĝaĵoj, ne pro la malsama aspekto de la homoj, sed pro la tuta etoso de la lando.

Kun esperantistoj tra 15 urboj

Ke mi ne estis tute senhelpa en tiu sorĉe alloga sed per sia malsameco iom timiga mondo, mi ŝuldas tion al esperantistoj, kiuj helpis al mi orientiĝi en tiu ĉi mondo, kaj ili malfermis por mi la pordojn de siaj koro kaj hejmo, por ke mi povu certagrade ankaŭ intimiĝi kun ĝi. Mi travagis la stratojn de Jokohamo, Tokio, Kioto, Makino, Takasago, Hirošima, Oosaka, Ikeda, Takacuki, Hirakata, Jamagata, Sendai, Nikko, Nagoja, Inujama, kaj aliaj lokoj, ĉiam akompanate de afablaj esperantistoj, kies nomoj plenigus almenaŭ tutan revupaĝon. Mi partoprenis ankaŭ la kunvenojn de ĉirkaŭ dek lokaj Esperanto-grupoj, kaj tio ebligis al mi formi imagon pri la „grizaj ĉiutagoj" de la japana Esperanto-movado. Mi povis konstati, ke la japanaj esperantistoj okupiĝas tre serioze pri la lingvo kaj ĝia kulturo: la Internacia Lingvo estas por ili ne simpla hobio, tempopasigilo, sed unu el la gravaj elementoj de ilia persona kaj socia vivo.

La laboro de la japanaj esperantistoj ne estas facila. Japanio estas lingve homogena lando, japanoj malmulte vojaĝas al eksterlando (jare nur 4-5 milionoj, eĉ tiuj ĉefe al Usono), kaj same ne oftas eksterlandaj turistoj en Japanio (ĉ. 2 milionoj dum unu jaro, ankaŭ ĉefe el Usono). Do, por kontakti eksterlandanojn ordinare por japanoj sufiĉas koni la anglan lingvon. (Estas alia problemo, ke la onidiro, laŭ kiu „ĉiuj japanoj parolas la anglan lingvon", veras maksimume tiom, kiom la supozo, ke „ĉiuj hungaroj parolas la rusan".)

JEI, KLEG kaj aliaj...

Kiel oni scias, en Japanio ne ekzistas tutlanda Esperanto-organizaĵo. Kun iom da simpligo oni povas diri, ke ekzistas du ĉefaj organizoj: Japana Esperanto–Instituto (JEI) kaj Kansai–Ligo de Esperanto-Grupoj (KLEG). Ili laboras paralele, JEI ĉefe en Tokio kaj norde, KLEG ĉefe en Oosaka kaj en Suda kaj Okcidenta Japanio. Feliĉe, oni ne spertas ian ajn ĵaluzecon en tiuj organizaĵoj, kaj ili harmonie kunlaboras, kiam tio estas necesa.

Tre kutima formo por ekzerciĝo kaj perfektiĝo en Esperanto estas la *kunloĝadoj*. Kunloĝadoj fakte estas du–tri tagaj intensaj kursoj pri lingvaj, literaturaj kaj movadaj konoj. La partoprenantoj estas dividitaj je malgrandaj homogenaj grupetoj, kiuj sub la gvido de spertaj esperantistoj vastigas sian scion pri Esperanto. Krom tio, ekzistas ankaŭ prelegoj, kiujn aŭskultas (jes, *aŭskultas*, ne nur ĉeestas!) samtempe ĉiuj.

Mi havis okazon partopreni tian kunloĝadon, organiziitan de KLEG en vilaĝo Makino, apud la lago Biva. Ĉirkaŭ 130 junaj kaj maljunaj esperantistoj lernis diligente kaj disciplineme dum tri tagoj. Jes *diligento* kaj *disciplinemo*, min kaptis ĉefe tiuj du trajtoj, ja similan diligenton kaj disciplinemon mi neniam ankoraŭ spertis en Eŭropo, nek en esperantistaj, nek en aliaj seminarioj. Mi havis ankaŭ okazon prelegi antaŭ ĉiuj partoprenantoj pri la temo „Kial Esperanto bezonas literaturon? " Ĝis nun mi cerbumas, ĉu mi vere sukcesis veki la interesiĝon de multaj homoj pri la temo, aŭ nur pro ĝentileco tiom multnombre oni aĉetis mian libron, jus eldonitan en Japanio: „Studoj pri la Esperanta literaturo"?

Alia grava esperantista aranĝo, kiun mi povis partopreni, estis la 67-a Japana Esperanto-Kongreso en Joko-

En unu el la studgrupoj dum la kunloĝado de KLEG. Maldekstre Mine Yositaka, redaktoro de „La Movado" kaj posedanto de la eldonejo „La Kritikanto", dekstre V. Benczik

V. Benczik prelegas dum la 67-a Japana Esperanto–Kongreso en Jokohamo





En la oficejo de KLEG, de maldekstre: Ueyama Masao, Vilmos Benczik, Miyamoto Masao, Masayuki Kuroda, Konisi Gaku

hamo. Ĝi ne estis kongreso de iu el la japanaj Esperanto-organizaĵoj, sed de ĉiuj japanaj esperantistoj. (Ankaŭ ĉi tie mi havis okazon prelegi, kaj la aŭskultantaro same favore surprizis min, kiel en Makino.) Dum du tagoj kunsidis en la kongresejo impona nombro da esperantistoj: ĉirkaŭ 500 homoj el ĉiuj partoj de la japanaj insuloj. Ĝin partoprenis nur deko da eksterlandanoj: eble al tiu fakto ŝuldiĝas, ke preskaŭ ĉiuj laborarangoj (amuzaj arangoj tute *mankis!*),okazis en la japana lingvo.

Neforgesebla travivaĵo estis por mi renkonti en la oficejo de KLEG (Oosaka) elstarajn esperantistajn literaturistojn, kiel *Miyamoto, Ueyama, Konisi, Kuroda* kaj aliajn, kaj poste gasti ĉe Miyamoto, kaj bierumante babili kun li ĝis la malfrua nokto. En Tokio atendis min – krom renkontiĝo kun novaj kaj malnovaj amikoj – alia surprizo: la impona, kvaretaĝa domo de Japana Esperanto-Instituto...

Kaj iom da turismo...

Eble estas sakrilegio, sed – diference de aliaj turistoj – mi ne trovis la japanajn naturbelaĵojn eksterordinaraj: ili estas kiel naturaj belaĵoj ie ajn en la mondo. Sed tre *unika* estas la maniero, kiel la japana arkitekturo (almenaŭ la klasika) kapablis harmonie lokigi ŝintoismajn templojn kaj Budhismajn pagodojn en la natura medio. En Kioto, Miaĵima (apud Hiroŝima) kaj aliaj lokoj tiuj konstruaĵoj ŝajnas esti kvazaŭ elkreskintaj el la tero, kune kun la ĉirkaŭaj arboj. Bedaŭrinde malofte estas same ĉe modernaj konstruaĵoj, tamen troviĝas esceptoj, kiel la Internacia Kongresa Halo en Kioto.

Ne per sia arkitektura beleco impresis la memormuzeo kaj pachalo en Hiroŝima: la avertaj restaĵoj de unu el la plej teruraj tragedioj de la homa historio kvazaŭ gravuriĝas en la cerbo de la vizitanto – tion helpas ankaŭ la luebla Esperantlingva klariga teksto sur magnetofonkaseto.

Eble la plej impresa natur-turisma aventuro estis la grimpado ĝis la pinto de Fuĵi (3776 m), en kvinkapa internacia esperantista societo, kun verda flago. La 25-an de aŭgusto 1980, je la 13-a horo kaj 30 minutoj sur la pinto de la sankta monto de japanoj flirtis verda flago!

Post tri semajnoj, kiuj ŝajnis forflugi rapide, sed en kiuj akumuliĝis ankaŭ neimageble multe da travivaĵoj, mi eniris la sovetan ŝipon „Bajkal" en Jokohamo nekompareble pli riĉe, kaj la dutaga ŝipvojaĝo – krom forpeli la fizikan lacecon – donis okazon iom digesti la travivaĵojn. Kompreneble la „plena digestado" postulos ankoraŭ longan tempon, sed unu afero jam nerefuteble konstateblas: Japanio estas tute alia mondo, esence tamen la sama, kiel la nia... Ankaŭ tie vivas homoj, kiuj – eble alimaniere ol ni – deziras travivi feliĉe kaj pace tiujn kelkdek jarojn, kiujn ni havas sur la Tero.

V. *Benczik*

Mihály Váci

Plej-epoko

Jen – ni tiel produktas per
la plej moderna teknologio por
la plej diversaj celoj niajn
plej samajn produktojn laŭ
la plej diversa klasifiko – sed enkadre de tio laŭ
la plej samformaj mezuroj, atentante
la plej vigle,
la plej akcepteble, ĉu ne, ĉar enkadre de unuj klasoj
la plej malgranda diferenco kaŭzus
la plej grandan konfuzon, tio estas eĉ
la plej klara,
la plej kompreneb la, ĉu ne?

La plej internacia intereso deziras
la plej universalan kontentigon de
la plej individuaj deziroj. Hodiaŭ estas tio
la plej individua, kio estas
la plej ĝenerale disvastigita. Ĝi estas pro tio
la plej originala, se ĝi estas
la plej pleje tia, kia estas
la plejparto de
la plej diferencaj. Ĉiuj volas iĝi
la pleje tiaj, kiaj estas hodiaŭ jam
la pleje ĉiuj. Tiu estas

la plej individua individuo, kiu estas
la plej simila al ĉiuj, kaj al kiuj oni povas simili
la plej facile. Tio estas

la plej originala, kio estas
la plej facile realigebla far
la plej multaj. Nuntempe tiu estas
la plej rezista, kiu estas
la plej facile akceptebla. Tiu estas
la plej opozicia, kun kiu povas konsenti
la plej multaj
la plej facile koncerne
la plej multajn aferojn. Tio estas
la plej revolucia, kio estas ludebla kun
la plej malmulta risko por
la plej senkulpa celo, kaj
la plej senutile por
la plej multaj.

Nuntempe tio estas la
plej
kio estas
nur.
Tio estas eble
la plej kompreneble ankaŭ por
la plej malmultaj
la plej vane, ĉu ne?

El la hungara: D-ro Miklós *Fehér*

István Torda

Jarcentoj de la hungara literaturo

11. Du poetoj

Attila *József* (Joĵef) (1905–1937) estas mondskale unu el la plej grandaj poetoj de nia jarcento[1]. Kelkajn monatojn antaŭ sia morto li serĉis oficistan postenon ĉe privata entrepreno. Al sia peto li aldonis aŭtobiografion, poste famiĝintan. Multe diras pri lia vivo la trista spegulo, titolita latine

«Curriculum vitae»

„Mi naskiĝis en 1905, en Budapeŝto, mi estas baptita ortodoks-kristano. Mia patro – la forpasinta Áron József – kiam mi aĝis tri jarojn, elmigris kaj min la Landa Ligo pri Infanprotektado donis al vicgepatroj en la vilaĝo Öcsöd. Tie mi vivis ĝis mia sepjara aĝo, jam tiam mi laboris, kiel ĝenerale la malriĉulaj infanoj vilaĝaj – mi estis porkpaŝtisto. Kiam mi havis sep jarojn, mia patrino – la forpasinta Borbála Pőcze – reportis min kaj mian fratinon Budapeŝten, kaj enlernejigis min al la 2-a klaso de la elementa lernejo. ... Kristnaske en la jaro 1919 mortis mia patrino. Tribunalo pri Familiaj Aferoj nomis vicpatro por mi mian bofraton, la antaŭnelonge formortintan d-ron Ödön Makai. Unu printempon kaj unu someron mi servis en la kargoŝipoj de la Akcia Societo „Atlantica", nomitaj *Vihar, Török* kaj *Tatár*... Mi estis sendita al la lernanthejmo Demke en la urbo Makó, kie post nelonge mi ricevis senpagan lokon... La 4-an klason de la gimnazio mi finis kun atestilo de nuraj „eminente", kvankam pro adoleskaĝaj psikaj krizoj mi kelkfoje provadis memmortigon. Jam aperis ankaŭ miaj unuaj versaĵoj, miajn poemojn verkitajn en mia 17-jara aĝo publikigis la revuo „Nyugat". Mi estis konsiderata mirakla infano, kvankam mi estis nur orfo.

Post la 6-a klaso mi forlasis la gimnazion... Pro la peto de du miaj ŝatataj instruistoj mi decidis tamen abiturientiĝi... Tiam mi jam estis enprocesigita pro Di-ofendado en unu el miaj poemoj. La Kortumo absolvis min... Mi fine decidis esti verkisto kaj ekhavi civilan okupon, havantan kontakton kun la literaturo. Mi aliĝis al la hungara–franca–filozofia fakoj de la filologia fakultato de la Szeged-a

La 14-jara Attila József kun la panjo kaj fratino

universitato... Mia profesoro Antal Horger, ĉe kiu mi estus devinta ekzameniĝi pri hungara lingvistiko, vokis min al si kaj ... diris, ke dum li vivas mi ne fariĝos mezlerneja instruisto, ĉar „al homo – li diris –, kiu verkaĉas tiajn versaĵojn – kaj li malfermis antaŭ mi ekzempleron de la ĵurnalo „Szeged" – oni ne rajtas konfidi la edukadon de la estonta generacio." ... Ofte oni parolas pri ironio de la sorto, kaj ĉi tie temas ĝuste pri ĝi: tiu ĉi el miaj poemoj, titolita „Pur-kore", iĝis tre fama, pri ĝi estis verkitaj sep artikoloj. Lajos Hatvany nomis ĝin plurfoje dokumento pri la tuta postmilita generacio „por la venontaj epokoj", Ignotus siaflanke „anime, luladis, karesis, duduis[2] kaj murmuris" tiun ĉi „belegan" poemon... La sekvan jaron – mi aĝis tiam dudek jarojn – mi veturis al Vieno, mi aliĝis al la universitato kaj vivtenis min el la gazetvendado antaŭ la enirejo de *Rathaus Keller*... Fine de la somero mi vojaĝis al Parizo. Ĉi tie mi aliĝis al Sorbonne... Poste mi venis al Budapeŝto... Institucio pri Ekstera Komerco dungis min kiel oficejan korespondanton hungaran-francan. ... Sed tiam min trafis neatenditaj sortobatoj, kiujn malgraŭ ĉiom da trejnoj fare de la vivo mi ne povis elteni. La Landa Institucio pri Socia Asekuro unue sendis min al sanatorio, poste al malsanulsalajra etato kun diagnozo *neurastenia gravis*[3]... Depost tiu tempo mi vivtenas min per mia verkado. Mi estas redaktoro de la literatura kaj kritika revuo „Szép Szó" (Bela Vorto). ... Mi konsideras min honesta, mi pensas, ke mia kompreno estas rapida kaj en la laboro mi estas diligenta."

Kio mankas el la aŭtobiografio: Attila József dum la granda ekonomia krizo en 1930 aliĝis al la neleĝa komunista partio, en kies vicoj li luktis ĝis 1934, kaj kvankam poste liaj rilatoj kun la partio rompiĝis, li ĝisfine konsideris sin komunisto, adepto de marksismo. La lastajn jarojn de lia vivo krom la malfacilaĵoj pri vivtenado pli kaj pli ombris la ĉiam pli graviĝinta neŭropatio. La 3-an de decembro 1937 en malgranda ĉe-Balatona ripozejo li ĵetis sin antaŭ trajnon.

Ordo, intelekto, scio

La komencanta juna poeto aliĝis al la lirika revolucio de la unua dekjaro de la jarcento, precipe al Ady. En Parizo li riĉiĝis je novaj travivaĵoj, lin kaptis ĉefe du grandaj majstroj: Villon kaj Apollinaire. Li lernis multon de skoloj de sia epoko, de la ekspresionismo kaj surrealismo, sed poste li lasis ilin for, kreante pli altnivelan poezion individuan. Dum sia evoluo verkista li renkontis ankaŭ la tendencon denove malkovri la popolarton, kaj la efikon de la postmilita komunista poezio germana. Ĉio ĉi estis nuraj elementoj, eroj, helpe de kiuj József kreis propran grandan poezion. Li devis descendi al profundaj inferoj: al tiuj de la solo, izolo, graviĝanta malsano, al tiu de la skizofrenio; li devis trairi ankaŭ la inferojn de la nacio. Post 1932 en la pli kaj pli obskura epoko, dum krakado de la botoj marŝantaj al la milito, malfermiĝis antaŭ li la sortoj de la baraktanta kampularo, humiligita laboristaro kaj intelektularo ne-trovanta sian lokon. En lia liriko tamen neniam mankas la perspektivo kaj la optimismo. Eĉ en la plej malfacilaj cirkonstancoj li parolas pri la „konstruita, bela,

En ĉiu oktobro multaj junuloj en memormarŝo pilgrimas al la kamparana domo en la vilaĝo Szentkirályszabadja, unu el la lastaj stacioj en la tragika vivo de Radnóti. La domo nun servas por memor-muzeo.

Miklós Radnóti

firma futuro". En lia poezio troveblas ankaŭ ludemo, ironio mokanta. Dum la dancado super la profundoj kaj la malhelo, en lia poezio ĉiam troviĝas io etereska kaj ĉarma. Li uzas senfinan aron da versformoj, strofpecoj, melodioj. Lian verkaron karakterizas kono pri la situacioj kaj baza realismo: senkondiĉa fideleco al la realo, rimarkado de la plej karakterizaj, foje de la plej etaj trajtoj de pejzaĝoj, de homoj, de grupoj. Sed li ne haltas ĉi tie: li konstruas el pecoj de la realo kompreneblan ordon, kunigas ilin en unueca pensosistemo. Li estas poeto intelekta. Liaj ŝatataj vortoj estas „ordo", „kompreno", „scio", „konsciado". Tiu ĉi intelekteco estas bazita sur la marksismo, la versojn de Attila József trapenetras ĝiaj pensoj, ĝiaj eksplikoj pri la kosmo kaj pri la socio. Tio ankaŭ signifas, ke li vidas la mondon per okuloj de la proletaro. En la altranga proletara poezio de Attila József kunfandiĝas elementoj individuaj kun la komunaj--sociaj.

Moderna poeto de ok eklogoj

Unu el la plej grandaj poetoj de la speciala antifaŝista liriko hungara estis Miklós *Radnóti* (1909–1945). Li perdis tre frue la gepatrojn. Edukis lin la onklo, kiu volis igi la nevon negoculo. Sed la junulo elektis alian vojon: en 1930 li aliĝis al la universitato de Szeged. Kiel fakulo pri la hungara kaj franca lingvoj kaj literaturoj li fariĝis unu el la gvidaj partoprenantoj de la grupo de progresemaj junuloj en Szeged, okupiĝantaj ankaŭ pri socia esplorado de la vilaĝoj. Miklós Radnóti vane estis talentega instruisto kaj arttradukisto, pro sia juda deveno nenie li ricevis postenon, li devis vivteni sin per tradukado kaj okazaj laboroj. Ekde 1941 lia vivo estis plena de servadoj en la t.n. „labortaĉmentoj" militaj, kien li estis plurfoje alvokita. Fine en 1944 li estis alportita al Bor (Jugoslavio), kie funkciis unu el la plej teruraj tendaroj. Kiam la germanaj faŝistoj evakuis Jugoslavion, la trudlaborulojn ili pelis marŝi al Germanio. La ĝismorte lacigitan poeton mortpafis unu el la gardantaj soldatoj apud la hungara urbo Győr. Kiam lia kadavro estis elhumigita, en poŝo de la jako estis trovita kajereto kun animskuaj poemoj, verkitaj ĉe la mortosojlo.

En la poemlibroj de la komencanta poeto regis ribelanta brusko[4]. En ili senteblis efiko de la tiutempa liriko franca, tiu de *Cendrars* kaj de la surrealistoj. La volumoj inter 1936 kaj 1939 montras poeton trankviliĝantan, kiu sopiras serenon, pacon, harmonion, nostalgias pri la regno de la klasikismo, sed la idilio estas rompata de la „antaŭludo milita", kiu sugestas malhelajn pensojn. En la poezio de Radnóti ĉiam senteblas la konscio pri la morto: eĉ apud la plej gaja pejzaĝo aŭ etoso li sentas, ke pli-malpli frue li iĝos viktimo. Neforgeseble li montras kolorojn de la karesanta naturo kaj minacon de la pejzaĝo antaŭtempesta.

La voĉo de Radnóti flugas plej alten dum la pleja danĝero, en la lastaj jaroj de sia vivo. En siaj ok *eklogoj* (el kiuj la lastaj jam naskiĝis en „Lager Heidenau, en la montoj super Zagubica") en dialogoj li enpoemigas sian hororon pro la terura nuno kaj la fidon pri paco kaj idilio, venontaj eble post lia morto. En tiuj poemoj Radnóti samtempe observas la rigorajn regulojn de la antikva ĝenro kaj uzas la kuraĝan bildfaran teknikon de la liriko 20-jarcenta.

Miklós Radnóti verkis ĝia sia lasta vivmomento, kaj tiel li fariĝis miraklo de la poeta disciplino, tiu de la animforta homo. Li montris per senkompareca precizo la mondon de la naziaj Lager-oj, li eternigis per matura arto poeta la staciojn de la mortovojo.

El la hungara: *P.A.R.*

Attila József

Panjo

Pri panjo ekde tagoj ade
mi pensas ĉiam pietate. –
Kun plena korb' al subtegmento
iradis ŝi kun diligento.

Homet' sincera mi kriegis,
stamfado spita, forta ekis:
tolafon lasu vi ĉi tie,
kaj portu nur min tien plie.

Ŝi etendadis la tolafon mute,
ne zorgis-skoldis min entute;
tolafoj valsis brile, stride,
flugadis al la alt' humide...

Ploraĉ' jam estus tarda, vanta,
mi vidas, estas ŝi giganta:
ŝi alte ŝvebas en aero,
bluigas akvon de l' ĉielo.

El la hungara:

El la hungara: Julio *Varga*

stamfi: kolere bati per piedoj la grundon
skoldi: riproĉadmoni
strida: orelŝire sibla (PIV)

1 Pli detale vidu en n-ro 2/1980
2 Zum-kantis
3 Grava neŭrastenio
4 Bruska: senpacience kaj akre malmilda, malĝentila (PIV)

Prestiĝa literatura premio por primovada romano

Éva *Tófalvi*, 33 j., studis en la Universitato de Eötvös Loránd en Budapeŝto, en 1971 estis diplomita pri la hungara kaj Esperanta filologioj kaj pri bibliotekista scienco, en 1976 akiris diplomon kiel ĵurnalistino finstudinte la internacipolitikan fakon en la lernejo de Hungara Ĵurnalista Asocio. Instruis hungaran lingvistikon kaj Esperanton en Pedagogia Altlernejo de Esztergom kaj dum tri jaroj skribis materialojn por la priesperanta elsendo de la Hungara Radio. Nuntempe laboras kiel redaktorino.

En 1978 unuafoje partoprenante en la Belartaj Konkursoj de UEA ŝi gajnis la 2an premion en la proza branĉo, sekvajare la 1an por la poezio.

Oldřich *Knίchal*, 41 j., finstudis historion kaj la ĉeĥan filologion en la Praga Universitato „Karlo", laboris kiel redaktoro en la internacipolitika fako, ekde 1979 en Budapeŝto. Krom la gepatraj ĉeĥa kaj slovaka regas kvin lingvojn.

Li plenumis diversajn komisiojn en la movado, en la lastaj 16 jaroj redaktis kvin Esperantajn periodaĵojn kaj dudekon da libroj. En 42 nacilingvaj kaj Esperantaj gazetoj publikigis – krom pluraj tradukoj – ĉ. 300 artikolojn rilate la Internacian Lingvon, krome du librojn en la ĉeĥa pri Esperanto. Lastatempe verkas originalan prozon – aperonta estas selekto de liaj originalaĵoj kaj tradukoj kaj por eldono estas preparitaj du kromaj volumoj – novelaro kaj esearo.

Jam en la jaro 1975 – por stimuli la originalan verkadon, precipe de romanoj – estis anoncita la Premio „Raymond Schwartz" por la plej bona fikcia prozverko en la Internacia Lingvo. Tiu ĉi premio – ĝin akompanas konsiderinde alta monsumo – estis atribuita okaze de la 65a UK en Stokholmo al la romano **„Kiuj semas plorante..."**, al kies aŭtoroj, geedzoj Eva TÓFALVI (Hungario) kaj Oldřich KNÍCHAL (Ĉeĥoslovakio) la redakcio de HV starigis kelkajn demandojn:

– Viaj biografioj montras paralelaĵojn, tamen vi estas diversnacianoj...

– Ni devenas el medioj diferencaj, sed ne malsamaj. Niaj najbaraj landoj elmontras en sia historia evoluo multe da komunaj trajtoj, kio influas ankaŭ individuon, eĉ se ne rekte. La plejparto de ĉeĥoj kaj hungaroj ne konscias pri tio, ĉar iliajn senperajn kontaktojn malhelpas la lingva diverseco. Tiun problemon ni jam delonge solvis dank' al la komuna lingvo.

– Antaŭe vi estis konataj kiel movadaj aktivuloj precipe sur la redaktora kaj publicista kampoj, sed ne kiel beletristoj...

– Malgraŭ tio ni ambaŭ havis tiaspecan ambicion, ja post la geedziĝo en 1977 ni vivas en la etoso, kiu favoras la verkadon peresperantan. Esperanto estas nia familia lingvo.

– Ĉu vi verkas plejparte komune aŭ aparte?

E.T.: – Laŭprincipe aparte, ĉar spite al paralelaĵoj jam menciitaj niaj verkistaj imagoj diverĝas laŭ la materialo konceptita kaj ankaŭ laŭ sia ĝenro. Ekzemple mi preferas poezion kaj romanon, mia edzo novelojn, eseojn...

– Kiamaniere vi kune verkis la romanon **„Kiuj semas plorante..."***?*

O.K.: – Iom kurioza historio... Mian edzinon obsedis tiu ideo ekde 1978, sed pro nia nekutima „kunvivado" – ni loĝis kelkcent kilometrojn unu disde la alia regule veturante inter la du landoj – la plano ne tuj povis efektiviĝi...

E.T.: – kaj kiam la limdato urĝis, tagnokte mi tenis la plumon skribante la romanon. Sinsekve mi transdonadis ties ĉapitrojn al mia edzo, kiu lingve kaj stile fajlis mian frazojn. La manuskripton ni sukcesis forsendi fakte en la lasta minuto.

– Pri kio temas la romano?

– „Kiuj semas plorante..." estas verko pri la abnegaciaj klopodoj de la esperantistoj en la tempo ekstreme malamika kontraŭ la lingvo Zamenhofa, en la jaroj, kiam la bruna pesto inundas Eŭropon kaj minacas per la milito. La movado fariĝas objekto de persekutoj, ĝiaj adeptoj viktimoj de la sekreta polico. „Kiuj semas plorante..." – kaj la titolo mem sufiĉe elokvente aludas la enhavon – starigas al si la senprecedencan taskon, prezenti per aŭtentikaj rimedoj la esperantistan movadon meze de tiuj dramplenaj eventoj.

– Kaj viaj plej proksimaj planoj?

O.K.: – En la eldonejoj kaj parte en mia tirkesto ŝimas tri volumetoj, kiuj aspiras baldaŭan eldonon. Fragmentoj el mia esearo – dume en manuskripto – jam aperis en aliaj lingvoj. Cetere mi verkas kaj pli verkos ankaŭ ĉeĥe.

E.T.: – Malsame ol mia edzo, mi verkas nur esperante. Temo de mia venonta romano estas ankaŭ primovada. Mi planas kolekti miajn novelojn por volumo.

– Dankon pro la intervjuo!

Éva Tófalvi – Oldřich Kníchal

KIUJ SEMAS PLORANTE...

(fragmento el la romano)

Ho, jes, mi devas fermi la ŝutron. Kvankam la pacientoj ne kutimas promenadi post la vespermanĝo, mi ne ŝatus, se doktoro Wolf kun Katarina sidiĝus sub mian fenestron, en tiu ĉi nekutima marta varmo, kaj rekomencus petoladon kisante unu la alian. Mi ne scivolas pri ili. Kaj tute fermita fenestro donas al mi pli da trankvilo kaj sekureco. Bedaŭrinde, la pordon oni ne permesas ŝlosi.

Kie ajn mi vivis, ŝlosiloj estis ĉiam en la manoj de aliuloj. Ajnaj ŝlosiloj, tiuj de la loĝejoj aŭ tiuj de mia ekzistado. Sinjorino Vera ne komprenis, kial mi ŝanĝas luĉambron:

– Ĉu vi ne fartas hejmece?

– Mi jam estas sufiĉe aĝa fraŭlo por fine ekvivi en kompleta loĝejo – banale mi pretekstis.

Eble ŝi kredis, eble ne, kiu scias. Post la transloĝiĝo ni ne pli renkontiĝos, mi ne volis riski, ke Karlo eksciu, en kiaj kondiĉoj mi vivas kaj, li apenaŭ kredus, ke la luksan loĝejon mi perlaboris honeste.

Dum unu monato mi trastudis la dokumentojn pri la Esperanto–movado, ricevitajn de Pander. Io sugestis al mi, ke li planas konsultiĝon kun mi en la Strato de Diantoj. Post la doktoriĝa ekzameno tio ŝajnis al mi tasko nefacila, la personeco de Pander estis tiel kurioza, ke nur kun abnegacio mi okupiĝis pri la vizito.

La Strato de Diantoj estis en tute alitipa kvartalo, ol kie okazis nia unua kunveno. Modernaj vilaoj ĉirkaŭitaj de alta heĝo, kun vastaj parkareoj. Ĝenerale la stratoj kun flornomoj. Numeron dek naŭ portis unu el la plej imponaj domoj de la proksima ĉirkaŭaĵo.

Mi sonorigis, sed la voĉo en apudporda parolilo konsilis al mi premi la klinkon. La enirejo estis libera. De tie gvidis sufiĉe longa vojo al duetaĝa vilao, poste tra larĝa ŝtuparejo al alia pordo. Ripeti sloganon ne plu estis necese, ĉar Pander venis malfermi.

– Ankoraŭ mankas ĉambristino – lia voĉo muĝis en eleganta vestiblo.

Tiu ĉi loĝejo estis nekompareble pli intima ol la antaŭa – freŝa odoro de la ĵuspentritaj muroj, tra la fenestroj larĝe apertaj radiis plensomera suno. Tute laŭkutima salono – novstilaj mebloj, kiujn mi ŝatis pli ol eksmodajn antikvaĵojn, malpezaj kurtenoj moviĝantaj laŭ la ekblovo de l' vento. Panoramo al verda ebenaĵo kun blanka brakseĝo kaj fontano.

– Kiel plaĉas al vi via loĝejo? – interrompis Pander mian meditadon. Verŝajne mi misaŭdis.

– Kia loĝejo?

– La via, sinjoro Bende.

– Ĉu sinjoro majoro bonvolas ŝerci?

– Nur duone.

– Mi ne komprenas...

– Nu, la loĝejo estas fakte havaĵo de la oficejo, sed ni disponigas ĝin ekde hodiaŭ al vi, sinjoro doktoro. Vi povos loĝi tie ĉi, ĝis kiam via laboro kontentigos nin. Se vi estos fervora, tiam ĝis la vivofino. Ĝi estas situita en taŭga medio, vi havos ĉambrojn por diversaj celoj, inkluzive de la servistoj. Pretere, dum vi restos fraŭlo, sufiĉas kuiristino kaj ĉambristino, ĉu ne?

– Jes,... jes... kompreneble, sed kion mi faros en tiom da ejoj?

– Ne estu etstila! Vi ja estas universitata profesoro.

– Nur asistanto...

– Nun tio ne gravas. Vi bezonas ne nur laborĉambron, sed ankaŭ bibliotekon. Se vi laboros en la universitato same kvalite kiel ĉe ni, vi ne tro longe restos simpla helpanto. Sed nun pri la loĝejo – do vi bezonas salonon, manĝejon, dormoĉambron, vidu, la plej bezonataj ejoj estas kvin. La servistoj loĝos en la suba etaĝo.

Mi sentis la koron salti en la brusto. Mi, kiu havis neniam pli ol unu ejaĉon, nun posedos la tutan vilaon.

– Ion mi montros al vi, ion espereble plaĉan – kaj li gvidis min al oranĝerio, kie pompis tropikaj kreskaĵoj.

– Ili bezonas priflegon. Malantaŭ la vilao estas ĝardenista dometo, sed la loĝanto ankoraŭ ne alvenis. Estu trankvila, ĉio servos al via komforto.

– Kaj kion mi pagos por ĉio ĉi?

– Tio ne estas via zorgo.

Mi restis muta. Mi sekvis la majoron de ĉambro al ĉambro kaj imagis brilan vivon en ili, brilan memstaran vivon, longe sopiratan.

En la salono Pander eksilentis. Ĉu eble esplorante mian strangan konduton? La ĝojo mutigis min, eĉ forgesigis pri dankvortoj.

Pander adiaŭis kaj foririnte enmanigis al mi ŝlosilaron. Sur ĉiuj ŝlosiloj estis slipetoj kun apartaj indikoj. Mi prenis ilin kun plezuro. Ŝlisoloj de *mia* loĝejo!

– Supozeble vi ne volas resti nun tie ĉi, sed translokigi viajn valizojn, ĉu ne? – atentigis majoro. – Aŭ sufiĉos post unu semajno...?

– Kiam ajn – mi kapbalancis.

– Interkonsentite. Dume vi havos la tempon por ĝiri en la banko la antaŭpagon pro viaj servoj. El tiu sumo vi devos pagi la servistaron plus viajn eventualajn elspezojn. Ni asignos al vi komence de ĉiu monato la sumon, kiun vi povos transpreni ĉiam post la kvina de la respektiva monato.

Mi ne demandis, pri kiel granda sumo temas, konjektante, ke ĝi sendube kovros miajn elspezojn. La parto fiksita por la servistoj estis sufiĉe modesta. Sed kial tion aludi, la majoro scias plej bone, kiom ili meritas.

– Estas tempo foriri – atentigis min denove Pander, al kiu devis esti evidente, ke mi apenaŭ povas satiĝi de la admira okulumado al la nova nesto.

Ekstere mi volis ŝlosi la pordon, sed la majoro kvazaŭ pretere intervenis:

– Lasu trankvile!

Je mia demando, ĉu la domo restos malfermita, li nur obskure interjekciis kaj per sia ŝlosilo fermis la pordon antaŭ mia nazo.

La mondo komencis abrupte turniĝi kaj la belega rezidejo malantaŭe ruiniĝi kiel elpapera imitaĵo. Neatendita ĝojo pro la luksa vilao en unu sekundo ŝanĝiĝis je animpremo. Sango perdiĝis de la vizaĝo kaj fluis suben al la piedoj, kiuj mekanike mezuris la ĝardenon al strata elirejo. Ĉe la adiaŭo Pander malŝparis unu kroman atentigon pri mia aspekto:

– Se vi hazarde ne estus sana, tiam nepre telefonu al mi!

– Dankon, mi fartas tute bone – mi klopodis certigi lin, sciante, ke estus absurdaĵo atendi de li aliajn ŝlosilojn.

ORIGINALA POEZIO

Edwin de Kock:

Saronstrato 5

Malfalsa voĉ', pasero,
ĝojpepis pri l' Oktobra tero.
Kaj jen, apude, mi
kun rava lokprivilegi' –
eksterurbano. Sur razen'
formiktrafiko: ven'
kaj iro preter niaj padoj,
kaj l' iam forirontaj radoj.
Neniu bru' aŭ fumo fuŝas.
Antaŭ la pordo kuŝas
hunjeto nigra, nia Viki,
kontenta ne ekspliki –
nur ĝui plian kun ni jaron.
Ĉi buntojn vidu, bedaron
en kiu Ria (flor' post floro)
plantis flagetojn de la koro
Kaj jen legomabundo
kreskis el nia fidprofundo,
ke ĉiu hom' rikoltos
kaj ĝuste flegos etan parton
de l' granda tero. Bonfarton
al la popoloj energiaj!
La novaj fruktoarboj? Miaj –
tridek, ĉiu kreskanta flamo
kiun pro verda amo
ĉi propraj manoj ekbruligis.
Sed postenserĉo jam instigis
retransloĝiĝi for.
Ho stulta, stulta kor'!

6. 11. 1979.

Jiři Kořínek:

Tri cignoj

Kiel blankaj demandsignoj
naĝas laŭ la bord' tri cignoj,
naĝas lante, elegante
mev-najbarojn ignorante.
Mole ilin maro lulas,
cignoj tempon ne kalkulas,
misveteron ne ektimas,
al ondegoj jam kutimas,
kaj majestaj blankaj koloj
ne ĝeniĝas de petoloj
de la feriantoj borde;
ili drivas siaorde,
jen kaj jen la kolojn mergas
dum mi vantajn versojn verkas,
kiuj bildu al ni iom
la ravantan cignotrion.

Lina Gabrielli:

Maldolĉeco

Tro puraj kaj naivaj
estis miaj deziroj
pro tio ili restis
nur revoj.
Mi ne konis
la malbonon
pro tio ĝin mi ne
rekonis.
Ĉu valoras nun
speguli min
en mia senmakula
konscienco,
se mi posedas vunditan
koron pro tio, kion
mi ne havis?

Julio Varga:

Epitafo

„Nur korpo lia" – trafa epitafo:
verkist' ripozas en ĉi tombo-kavo.
Pasema korp' similas nur al krusto;
en kreitaĵo estas vivo, frukto!
Sed – ve – la Tero multajn homojn portas,
kiuj ne vivas, nur vegetas, mortas.
Glazur', ekstero: aĉa ŝajn-dekoro,
se mankas en anim' grandec', valoro.
Por tiuj estu (post alven' de l' Fino)
la epitaf': „Polviĝas tie ĉi animo."

John I. Francis:

Timo

Mi vagas sola sur strato senlima.
La plaŭdo de la ondoj,
la flustro de la ondoj,
iu sensono aŭdebla
batante en cerbo celante al sub horizonto
enfermas en kristala puro min.
La ekstrema plato konkavetas.
Kiel diferenca de dezerto?
La plaŭdo de la ondoj

batadis seninterrompe en la cerbo
kaj tiuflanke-iuflanke nigro minacas
levi sin desub horizonto super la zenito kaj surfali min,
inunde, enferme, bonvene ombrige neniigi.
Sed de kie?
La strato sin etendas sen limoj.

Soldatoj de Lajos Szalay

Sidanta soldato

Ekzekuto

Li estis soldato

Kvankam li vivas ekde 1946 eksterlande (Argentino, Novjorko, Parizo), tamen li estas la plej talenta Majstro de nuntempa hungara grafikarto, desegno. Mi ekkonis lin en 1972, kiam oni aranĝis grandan Szalay-ekspozicion en Budapeŝto, kaj ni denove povis vidi en Hungara Nacia Galerio (1980), preskaŭ lian tutan verkaron. Pli precize: ne estis videblaj ĉiuj Szalay-folioj (nur 250 bildoj), spite al tio estis plena lia mondo, kiu kapablas respeguli la tutan historion de la homaro ekde Kaino kaj Habelo ĝis la atombombo. Jes; ĉar ili estas la plej signifaj ekstrempunktoj de nia sorto.

Tial interesis, ekskuis min plej multe la soldatoj de Szalay, kiuj estas ĉefrolantoj en multaj grafikaĵoj. Kial desegnas Szalay ĉiam, en ĉiuj jaroj soldatojn? Sendube tial, ĉar li havas grandan animon, intelekton, fortan altiriĝon al ĉiuj suferantoj, kaj tial, ĉar laŭ la historiistoj estas konataj al ni ĉ. 16 000 militoj. Do, en ĉiuj jaroj furiozis kelkaj militoj sur la Tero!

Kaj en tiuj Grandegaj Dramaj Scenoj rolas milionoj da Soldatoj. Sed kia stranga, mistera estaĵo Li estas? Simpla homo – sed kun armiloj! Ankaŭ soldato estas ĉiutaga homo, ja li estis ĝis la momento de la milito kamparano, laboristo, inĝeniero, instruisto, komercisto – sed kiam li devas preni pafilon, tiam naskiĝas la Soldato.

Jes, ni konas soldatojn, kiuj batalis sen timo, kiuj mortigis senkompate malamikajn soldatojn – kaj civilulojn, virinojn, infanojn. La soldatoj de Szalay estas aliaj. Ili restas homoj ankaŭ en uniformoj, havante pafilojn, bombojn, ili mortigas, ĉar tiel ordonis ONI, sed ili fariĝos ankaŭ la viktimoj, kiuj fine pereos.

Dum la dua mondmilito Szalay desegnis francajn soldatojn sidantajn en la trancĉeo, germanojn en januaro de 1943, marŝantajn sur la senlima, rusa neĝkampo; ili estis francoj, germanoj laŭ la uniformoj, armiloj. Poste liaj soldatoj jam apartenas al neniu nacio aŭ lando – nur al la Homaro –, ĝi ankoraŭ en la fiera 20-a jarcento de la „moderna civilizacio", en la granda epoko de la termonuklea energio kaj spacveturado, ne sukcesis venki mem la teruran, neracian Militon!

Jen, rigardu nur tri bildojn. *Sidanta soldato* – li titolis ĝin. La gesto kaj la grandformata (ektima kaj enpensa) kapo karakterizas ĉi tiun figuron. Kio li estis antaŭe? Kamparano aŭ fiŝisto? Eble. Ŝoforo aŭ profesoro? Ĉi tie ne gravas. Li estas nur soldato, kiu atendas ordonon: pafi la malamikon aŭ ekzekuti iun partizanon, garantiulon, viron aŭ virinon, plenkreskulon aŭ infanon – sed ankaŭ tiu detalo ne gravas.

Ni studadas la duan bildon – *Ekzekuto* – ŝanceliĝante, kaj jam ni sentas, ke post la adiaŭaj vortoj de la pastro li devos pafi partizanon (garantiulon) senŝancele. Sed eble ankaŭ tial li kuŝos baldaŭ sur la tero, mortonte.

– *Li estis soldato.* Jen, refoje senarmile, nur kiel homo, ĉar ankaŭ lia sorto plenumiĝis.

Linioj kaj bildoj, sen eĉ unu vorto, tamen estas la verkaro de Lajos Szalay kvazaŭ Biblio de la homa historio. Tial mi kuraĝas diri sume mian impreson, opinion: Szalay estas ne nur la plej granda hungara grafikisto de la nuna jarcento, sed li kompareblas al Picasso – kiu cetere mem rekonis, ke Szalay meritas ĉi tiun rangon.

Mihály *Gergely*

Nuntempaj gimnazianoj

PANORAMO

450-jara mezlernejo

Svedaj kaj japanaj gastoj

Infanĝardenistinoj el Svedio kaj japanaj muzikinstruistoj vizitis Hungarion por studobservi la instrumetodon de Zoltán Kodály. Kanto- kaj muzikinstruadon ili vizitis en la Budapeŝta bazlernejo de strato Szemere.

Kvar jarojn post la funebra malvenko kontraŭ la turkoj ĉe Mohács, dum la epoko de la reformacio estis fondita la unua mezlernejo de Hungario en Túr:

la hodiaŭa Mezőtúr. Tiu Kalvinana gimnazio – fondita antaŭ la famaj kolegioj de Sárospatak kaj Debrecen – dum jarcentoj peris la klasikan klerecon en la mezo de Hungario. La hodiaŭaj lernantoj alproprigas krom la ĝeneralaj studobjektoj ankaŭ fakkonojn de agrikultura mekaniko kaj dudek–, dudek kvin procentoj el ili ankaŭ studas plue en altlernejoj aŭ universitatoj.

Gastoj kaj gelernantoj en la kanto-horo

Aŭstra–hung

Laborplano por aŭstra–hungara junulara kunlaboro en la periodo inter 1981–83 estis subskribita en la „Gobelin-salono" de la Parlamentejo. La interkonsenton subskribis de Aŭstria flanko D-ro Johann Altenhuber, ministra konsilisto, grupestro de la Mi-

János Barabás kaj D-ro Johann Altenhul

Fakulo manipulas la aŭtomatan premmasînon por vulkanizi la transportajn bendojn



Eksporto el Szeged

Duonon de siaj produktaĵoj eksportas la gumfabriko Taurus en Szeged. Ĝi produktas profundborajn kaj hidraŭlikajn tubojn, krome transportajn bendojn por la konstruindustrio kaj la minejoj. Tiuj bendoj parte jam estas faritaj en flamrezista kvalito.

*** PANORAMO

100-jara MTI (Hungara Novaĵagentejo)

György Aczél, vicprezidanto de la registaro parolas en la jubilea solenaĵo de MTI

Centjaran datrevenon de sia fondiĝo solenis la Hungara Novaĵagentejo MTI. Krom elstaraj personecoj de la hungara politika kaj socia vivo partoprenis la solenaĵon gvidantoj de IPTC (Konsilio Internacia pri Preso kaj Telekomuniko) kaj reprezentantoj de 34 eksterlandaj pres- kaj fotoagentejoj. Carl Sandelin, ĝenerala direktoro de la finna novaĵagentejo FNA, vicprezidanto de la Ligo de Eŭropaj Novaĵagentejoj, salutis la kunlaborantojn de la jubileanta hungara agentejo.

ara kunlaborado

nisterio pri Edukado kaj Arto; flanke de Hungario János Barabás, sekretario de la Ŝtata Junulara Komisiono.

Partoprenis en la solena evento ankaŭ D-ro Johann Josef Dengler, la ambasadoro de Aŭstria.

interŝanĝas la subskribitajn dokumentojn

La „kupolo" de la grandega gasrezervujo estas kunmetita el sesdek kvar ŝtallamenelementoj

Fluidigi gason

Grandega gasrezervujo de tridek mil kubaj metroj estas konstruata apud Szeged sur la tereno de la Ŝtonoleo– kaj Tergas–produkta Entrepreno de la Granda Ebenaĵo. En la dudeksep metrojn alta ujo kun diametro de 40 metroj oni rezervos sub minus 40 grada temperaturo la fluidan propan-butan gason.

Romiaj memoraĵoj



La esplorlaboroj pri la Romia antaŭulo de urbo Sopron, *Scarbantia,* atingis signifan punkton. Proksime al la nuna centro de la urbo, parte sub la ĉefplaco, troviĝas la Forumo de la antikva Scarbantia. Ĝi estis kovrita de grandaj ŝtonaj platoj, simile al la Forumo en Romo. Antaŭ la enirejo de iu tiutempa publika konstruaĵo sur la Forumo nun estas malkovritaj grandaj sokloj konvenaj por statuoj de rajdantoj. La skulptitaj blokoj devenas el la proksima ŝtonminejo de Fertőrákos.

Konservado de la malkovritaj sokloj en Sopron

20 milionoj da vinboteloj - plenaj

Sur ĉ. 7 mil hektaroj estas produktataj vinberoj en la regiono de Tokaj. El ili dektri diverspecajn vinojn oni enboteligas en la uzino de la Ŝtata Bieno de Tokajhegyalja en la vilaĝo Tolcsva. En la uzino ĉiujare estas plenigitaj 20 milionoj da boteloj de diversaj grandecoj.

Senfina vico da boteloj, plenaj de Tokaja vino

malpliigas
elfalon,
stimulas
kreskadon

de haroj

HERBÁRIA

LIKVAJO
BÁNFI

REVUO DE REVUOJ

Ofte mi aŭdas opiniojn, ke nia belsona lingvo kun siaj vastaj ebloj al rimado kaj ritmado, tro invitas versojn forĝi, eĉ ek-esperantistojn. Dubinde, ĉu ili havis similan inklinon en la nacia lingvo, kaj ĉu ili same ŝatas poemojn de *aliaj*? Nu, pri tio ne troviĝas esploritaj ciferoj. Al eventualaj esploremuloj mi rekomendas, tiucele nur singarde preni kaj knedi statistikon pri poemlibro-merkato ... La observanta (litera)turogardisto povas tamen signali ion: multaj E-revuoj neglektas la poezion, kio ne troviĝas sur iliaj paĝoj. Efektive elstaras LA BRITA ESPERANTISTO (inter la landaj gazetoj), kiu i.a. regule publikas el la ĉarmaj Rakontoj de Canterbury, majstraĵo de *Chaucer* (Ĉoser), patro de l' angla poezio.

Pri tiu manko de poemoj iu verŝanto de versaĵoj foje tutserioze asertis antaŭ mi, ke la redaktoroj ne emas veki apetiton per unusola poemo al la „avidaj" legantoj, ĉar pli da versoj prenus lokon de „neniel forlaseblaj" lokaj –rondaj komunikoj (?). Scias la diablo aŭ dieto. Kiel ajn estas ekzistas ankaŭ poemgazeto, la modesta NOKTO redaktata en Hirosaki, Japanio. En ĝi nuraj poemoj, novaj kaj klasikaj, oni plezure povas... Ho, mi preskaŭ kolapsis ekvidinte konatan poemon de Julio *Baghy* – „el Greklando"! ! ! Kaj same ĉe la revolucia hungara poeto Endre *Ady*! La du poetoj do postmorte transloĝiĝis al Grekio; eble pro la alta respekto de la redaktoro, rekte al la Monto Parnaso en societon de Apolono kaj Muzoj. En tiu senco evidente mi konsentus.

„Falsaj profetoj" ricevis pravigeblan pikon de Artur *Baur* (jam honora membro de UEA) en SVISA E–REVUO, kie li firme elpaŝis kontraŭ la blufantoj, kiuj aklamas E-on lingvo de reguloj kaj sen esceptoj. Kompreneble temas pri sincera, sed ne sufiĉe pripensita parolo de propagantoj. Evidente nia *viva* lingvo havas – kaj devas havi – da reguloj multe pli ol 16, sed eĉ tiel, multe malpli ol iu ajn alia lingvo. Artikolo modele konciza – kiel estas atendeble de Baur, kiu citis kelkajn el la esceptoj; mi mencias nur *unu(n)* – jen!

Embaraso foje de landaj gazetoj, ĉu la tekstoj estu nacilingvaj aŭ E-aj? Ankaŭ la redaktoro de L' ESPERANTO, la multflanka Aldo *de Giorgi* luktas, ne sensukcese, kontraŭ amasiĝo de *itallingvaj* raportoj, kiuj forprenas eblecon de praktikado en E-o. Ne facile diveni, ekzemple kial Dario *Besseghini* skribis itallingve sian eminentan artikolon pri KONTAKTO, se la publiko kiun li alcelas, konsistas el tiuj, kiuj uzas nian lingvon kulturcele en sia vivo. Krome li kiel redaktoro deklaras, ke tiu revuo de la junulato kutime preterlasas aferojn de la „adulta" movado, sed traktas vaste pri la ekstera mondo, gardante altan kulturan nivelon. Pri lia pravo mi jam plurfoje havis laŭdindajn ekzemplojn por raporti ĉi tie; en tiu vico alstaras ankaŭ la kompleksan vidmanieron spegulanta numero (ankaŭ grafike) pri la mondo de *komputiloj*. Certe ne distraj legaĵoj, sed des pli konvenaj kaj konvinkaj.

Se lertaj manoj organizas kaj en popola atmosfero, admirinda moviĝo povas ekesti. Tio pruviĝas en la imponaj informoj de POLA ESPERANTISTO: *sescent* personoj prezentis en kadro de tutlanda konkurso sian artan kapablon per E-o en diversaj artformoj. Oni deklamis, muzikis, komponis kaj tradukis, sur la podioj regis entuziasma E-a etoso. Mian atenton aparte vekis la lingva seriozeco de la direktantoj. Tio reliefiĝis plej klare en artikolo de A. *Pettyn*, kiu atentigis la partoprenintojn/ontojn pri la faritaj lingvaj pekoj, kaj admonis ilin al la nepre dezirinda ĝusta uzo de E-o pere de plua lernado kaj studado. Tio helpas kontraŭ fuŝtradukoj kaj – edukas bonajn uzantojn de E-o.

Tia amasa „insurekcio" ĵetas instigojn certe ankaŭ al ankoraŭ ĝermantaj movadoj. Nia historio perfekte pruvis la vivkapablon de E-o tra ĉiaj ŝtormoj. Jen, venis modesta INFORMA LETERO el la mallibera Ĉilio, kiu anoncas revigliĝon ankaŭ tie: kursoj en universitato kaj alie vastiĝas.

Sed mi revenu al aferoj de la revuoj, inter kiuj kun plezuro estas rimarkeblaj signifaj ampleksigoj kaj evoluoj. Nun almenaŭ pri du venu mencio. Pri BULGARA ESPERANTISTO, kiu konsiderinde moderniĝis aspekte kaj iĝis pli vasta enhave. Impresas en ĝi la movada vigleco kun la familiara etoso, la fortaj simpatioj de eksteraj emimentuloj. Mi trovis aparte dankinda la publikigon de movadhistoriaj artikoloj en tiu revuo, pasie partia por la socialismo kaj profunde nacia.

Transoceane, en la vastega Kanado nun redaktas kaj presas la aktivega Rüdiger *Eichholz* – kaj jam kvazaŭ superflue skribi, ke abrupte altiĝis ĉiurilate la nivelo de LUMO. Inter aliaj seriozaj eroj la redaktoro denove emfazas kaj pruvas, kie kaj kial estas preferinde *per majuskla* litero skribi ĉiaspecajn *nomojn* (personajn, geografiajn ktp.), ankaŭ se derivataj (eĉ se troviĝas en naciaj lingvoj alia kutimo). Pro ties avantaĝoj ankaŭ H.V. sekvas jam delonge tiun principon de la Esperanta ortografio.

Ervin *Fenyvesi*

Ni prezentas nian kunlaboranton pri medioprotektado

HV: Nia legantaro konas vin nur kiel aŭtoron de niaj artikoloj pri akvoaferoj kaj medioprotektado en Hungarlando. Bonvolu nun iom paroli pri viaj personaj rilatoj kun ĉi fako!

D-ro Ferenc László: Eble kurioze, sed mi devenas el regiono de multaj riveroj. La ĉeta vilaĝo, mia naskloko, **Örsujfalu**, proksime al **Komarno** (Komárom), kie mi finis gimnazion, estas kvazaŭ ĉirkaŭataj krom la Danubo de riveroj **Vág, Nyitra, Zsitva** kaj etaj aliaj. Certe tial, emocioj ricevitaj de ili sekvas min tra la tuta vivo jam, ankaŭ miaj postenoj ĉiam rilatis al tio.

Post diplomo de la „K. Marks" Ekonomia Universitato mi atingis ankaŭ la gradon **kandidato** de agrokulturo, laŭteme pri nova scienco: scienco de direktado. En ĉi temo jam aperis pluraj miaj verkoj. De kvaronjarcento mia laborloko estas la **Landa Oficejo de Akvoaferoj**, mi direktis la ĉefsekcion t.n. direkcian kaj samtempe la sekretariaton de la **Registara Komisariato pri Inundprotektado**. Ambaŭ postenoj funkciis ankaŭ kiel gravaj instancoj, kontaktas kun la magistratoj, konsilioj, departementoj, kaj inter la diversaj aliaj taskoj ni estis plenumantoj de la propagando kaj gazetservo.

HV: Tiel vi havis nepre larĝan horizonton pri la mediaj aferoj.

D-ro F. L.: Memkompreneble, sed mi devas ankoraŭ mencii kelkajn similtemajn okupojn. De 20 jaroj mi redaktas la monatan fakrevuon „Hungara Akvomastrumado", kiu inaŭguris suplementon pri medioprotektado. Precipe pri ĉi lasta mi okupiĝas ankaŭ kiel **tit. docento** en la Universitato de Kemia-industrio (Veszprém), instruante **organizadon de medioprotektado** al inĝenieroj de fabrikorganizado. Dum mia vasta agado mi alvenis al la konstato, ke la afero de l' akvoj, ties protektado, kiel ajn multflanka ĝi estus, ne estas distingebla – aŭ disigebla, se vi volas – de la ĝenerala protektado de la naturfortoj ceteraj. Medio, aŭ ĉirkaŭaĵo, estas unu kompleksaĵo, la homa senpripensa agado malbonefikas okaze **al tiu tuto**, kaj inverse, la natura medio same komplekse rilatas nin, efikas al la homaro. Kaj ne nur al la tiea loĝantaro! Estas konataj la fenomenoj kaj ekzemploj: kiel atingas naturaj efikoj regionojn sufiĉe malproksimajn de la devena loko de iu faktoro, ĉu malbona, ĉu ne. Tion pesi estas cetere ĉiam granda problemo, ne simple respondebla plej ofte. Memoru la inundojn de la Nilo...

HV: Internacia organizado ŝajnas do efika rilate la plej grandajn zorgojn.

D-ro F. L.: Pri tio mi prelegis antaŭ jaroj en **Gyula** kadre de Somera E-Universitato: „Medioprotektado kiel tutmonda zorgo". Vere efika favore al la homaro, samtempe ankaŭ al la loka loĝantaro, ekonomio ktp. povas esti protektado nur per internacia kooperado. Ĉirilate prezentas belan ekzemplon la Danuba kooperado de la trafluataj landoj, ja tio havas jam certan tradicion el la antaŭa jarcento. La pruviĝintaj ideoj de la grandaj antaŭuloj estas konsiderindaj denove kaj daŭrigindaj laŭ mia konvinko, ja la efikoj de la naturaj procezoj ofte prezentiĝas nur dum longa daŭro, sekve la iamaj spertoj-observoj, la historieca konsidero estas fundamenta postulo, eĉ por inĝenieroj. Nur tiamaniere ili kapablas konsideri la sekvojn ekz. de iu nove planita teknologia procezo. Tiel la faka laboro devas ricevi iom da humana, da socia vidpunkto. Sian medion kie li aŭ ŝi laboras, devas la inĝeniero, la fakulo rigardi **sistemo**, do en maniero tute kompleksa.

HV: Restas do multe por modifi opiniojn, precipe direkte al la internacie efikantaj faktoroj. Ĉu la interŝtata kunlaboro havas jam rezultojn?

D-ro F. L.: Oni povas diri, ke ĉio ĉi disvolviĝas jam sukcese, kvankam estas ankoraŭ multe por fari. **Jugoslavio** ekzemple regule **luas** niajn Danubajn glacirompajn ŝipojn vintre, por disrompi la glacitavolon en „siaj" riveretapoj. Estas ege grave en tiu rilato fundamenti la kunlaboron ankaŭ per determinado de la fakaj terminoj, ofte tute alie uzataj. Internacie pionira verko estas redaktata ĉe ni, la plurvoluma **Leksikono de Akvomastrumado**, kies redaktoro estas mi inter pluraj.

La akvo estas/estis ĝis nun kvazaŭ ia senkosta materialo: ankaŭ la Esperanto-movado povas siaflanke vaste disvastigi la neprecon de ŝanĝo tiurilate. En nia sfero Esperanto **havos multe da sukceso**, mi certas. Mi mem, edukite per la greka kaj latina lingvoj klasikaj, krom la slovaka kaj germana lingvokonoj, kapablas nur en pluraj slavaj lingvoj kaj angle legi la fakliteraturon. Kvankam mi legas Esperante, pro miaj egaj okupoj ankoraŭ mi ne alvenis por verki en la Internacia Lingvo.

Mi serĉas kaj esploras ankoraŭ konstante en mia elektita fako. Tial mi dankas la tutmondan eĥon, venantan de la legantaro de HV. Miaj novaj planoj? Konigi al la publiko de HV la freŝajn rezultojn, precipe teknikajn, koncerne la akvomastrumadon kaj medioprotektadon en Hungarlando – finis la intervjuon d-ro Ferenc László.

Ervin *Fenyvesi*

D-ro Ferenc László

La Muzeo pri Akvoaferoj en Esztergom

La historia urbo Esztergom antaŭ ne longe iĝis pli riĉa per nova kultura institucio: en restarigita arta palaco ekrezidis la Muzeo pri Akvoaferoj (en la strato Kölcsey).

La elekto de la urbo por tiu muzeo ŝajnas aparte trafa. Ne nur pro la fakto, ke abundiĝis la vico de la muzeoj en tiu urbo, sed ankaŭ pro la majeste preterfluanta Danubo. La riverego kvazaŭ emfazas la valoron de tiu muzeo, kiu multflanke prezentas la rolojn de l' akvo.

La vizitantoj de la muzeo plezure povas konstati, kiel riĉa kaj bone ilustrita estas la demonstrado pri la tuta akvomastrumado kaj pri la historio de Danubo. Ne mirinde, ĉar la zorgado pri la akvoj, la akvomastrumado en Hungarlando ĉiam signife akompanis kaj kontribuis al la socia kaj ekonomia disvolviĝo.

Restaĵoj kaj skribaĵoj abunde atestas, ke en la hungara teritorio jam la Romianoj plenumis hidroteknikajn laborojn. La plej potenca popolo de l' antikveco iom antaŭ nia erao okupis la valon de l' Mez–Danubo. Laŭ nomo de tiea popolo ili nomis la novan provincon Panonio, kaj la riveregon latinigite Danubius. Kvazaŭ donaco de la naturo, la grandega fluo favore firmigis la limdefendon de la imperio, kaj iĝis samtempe por ĝi grava trafiklinio. „Danubo estas feliĉo por la Romia Imperio" – diris imperiestro *Aŭgusto*, kaj la eminente organizantaj Romianoj sciis utiligi ĉiujn avantaĝojn de la riverego favore al siaj civitanoj.

La Provinco Panonio rapide kreskis je loĝantoj. Florantaj urboj konstruiĝis, precipe laŭlonge de la rivero: Győr, Komárom, en la Danub-kurbo, ĝis Buda, t.e. Aquincum, ĉiuj kun fortikaĵoj kaj legio-tendaroj. En la nuna Transdanubio disvastiĝis ĝarden– kaj vinberkulturo, la pejzaĝoj iĝis abunde produktaj, dise vilaoj estis konstruitaj.

La Romiaj ruinoj gardas ankaŭ monumentojn de la hidrotekniko far la grandioza antikva popolo. Ekzemple dum regado de *Galerius* estis elfosita la nuna Malgranda Rába, la fluujo de Gyöngyös tra urbo Szombathely, la Kanalo Principalis, kaj okazis drenado de Balatono tra fluo Sió. Estas konate, ke la Romianoj konstruis en Aquincum publikan banejon, kloakaron, akvokondukilon, kies pilieroj estas ankoraŭ videblaj.



Tralasilo volba el la Romia periodo en ŝtondigo

Apud urbo Várpalota, ĉe lageto Kikeri, restis digomuroj, sur kiuj kondukis la ĉefvojo al Aquincum. Skribitaj restaĵoj pruvas, ke imperiestro Marcus Aurelius *Probus* – deveninta el Panonio – provis sekigi marĉojn en Transdanubio. Restaĵoj de tiuj hidroteknikaĵoj vekas eĉ nuntempe miron ĉe fakuloj, kiel perfekte oni solvis tiutempe teknikajn problemojn. La brilan historion de la hidrotekniko elokvente pruvas ruinkampoj de ĉiu urbo, fondita de Romianoj, ekde Savaria (Szombathely) ĝis Aquincum.

Pli poste, en la 11a jc la hungara ŝtato ofte disponis por certaj akvaj laboroj, ĝenerale por konstrui la damaĝojn kaŭze de akvoj. Multaj dokumentoj atestas, ke tio okazis ne nur por defendo, sed ankaŭ por utiligo de la akvoj. En la mezepokaj ĉartoj pri reĝaj donacoj troviĝas ofte mencioj pri fiŝkaptejoj, artefaritaj fiŝlagoj, por fiŝbredado uzitaj eksaj fluejoj. Ilia granda nombro montras ankaŭ kiel gravaj posedaĵoj ili estis. Apenaŭ troviĝis granda bieno, al kiu ne apartenis iaspeca fiŝejo.

Dum la mezepoko la akvomueliloj konsistigis la alian gravan branĉon de la akvomastrumado. El la 11a–12a jarcentoj originas la unuaj dokumentoj pri ili; ankoraŭ en 1894 – dum tutlanda registrado – troviĝis muelilo fondita en la 11a jac, kaj 52 mueliloj devenantaj el la mezepoko! Krom mueli grenojn, ili milope plenumis tre diversajn servojn metiajn: produktis tanilon, oleon, prilaboris drapon, rompis ercon ks. La unuaj hidroteknikaj fakuloj venis probable el inter la akvomuelistoj.

De pratempo okupiĝis jam hungaroj pri navigado – kion pruvas ankaŭ la dumiljara finn-ugra devena vorto de ŝipo (hajó). La fiŝkaptistoj bezonis boaton, kiun oni elkavigis el trunko unusola. Sur marĉoj oni uzis kan-floson. Flosoj el trunkoj transportis de la Supra Tiso kaj sur rivero Maros la salon, tiun ege gravan varon de la mezepoko. Ekspluatado kaj transporto de la salo estis monopolo de l' reĝoj, kiuj uzis ĝin ofte por donacoj, samtiel la aliajn riverajn enspezeblojn: la koncesiojn pri pramo kaj pri trapasejo. Por ties necesa sekureco reĝaj dekretoj plurfoje ordonis certajn hidroteknikajn farendaĵojn.

Dum la mezepoko kontraŭinundaj digoj kaj bordoŝirmiloj, drenkanaloj estis bezonataj precipe por lokaj celoj, ĉar la produktivaj kampoj estis pli ol sufiĉaj kompare al la bezonoj de la loĝantaro. La plej malnovaj mencioj pri la protektado kontraŭ akvodamaĝoj troveblas en epoko de reĝo *Béla la 4a* (1235–1290). Estas rimarkinde, ke en la unua kodigo de la tradiciaj kutimrajtoj far juristo *Werbőczy*, li devis detale trakti pri bienrajtoj okaze de fluujo-ŝanĝoj. Li aludas ankaŭ je arte kaŭzitaj modifoj de fluujoj.

Sekve de la menciitaj tre diversaj hidrologiaj laboroj, kaj tiuj de la postaj jarcentoj, ekzistas tre multspeca kaj vasta aro da hidroteknikaj restaĵoj. Ilin publikigi estas grava tasko de la Muzeo pri Akvoaferoj, kaj ĝi laŭdinde plenumas tion. Tion konvene servis – kvazaŭ antaŭuloj de la nuna muzeo – ĝiaj ekspozicioj, organizitaj dum la lastaj du jardekoj, depost ĝia fondiĝo en 1961. Tiuj okazis i.a. en Siófok, Nagycenk (kastelo de Széchenyi), Gyula, Szekszárd, en la Budapeŝta Citadelo. La amasa vizitado tie videble montris, ke la publiko nuntempe forte interesiĝas pri la pasinto de la akvaj aferoj. Tiubaze estas vere atendeble,

ke la interesiĝo pri la muzeo pli kaj pli kreskos, sekvonte la pligraviĝon de la akvomastrumado.

La unua ekspozicio en la nova domo de la Muzeo havis la titolon: *„La historio de Danubo; la hungara akvomastrumado ekde la pratempoj ĝis hodiaŭ."*.

1. La historio de Danubo

Tiu parto de la ekspozicio antaŭmetas buntan kaj instruan trarigardon pri pasinto kaj nuno de la plej internacia rivero, – informante eĉ pri la jam planitaj, sed nur farotaj laboroj koncerne la riveron.

Klare manifestiĝas, ke Danubo estis ĉiam grava faktoro por la ekonomia-socia disvolviĝo de la apude vivantaj popoloj. Laŭ arkeologiaj trovaĵoj, la unuaj hordoj aperis ĉe ĝiaj bordoj antaŭ ĉ. 5–600 mil jaroj. Novaj kaj novaj homgrupoj sekvis ilin, la primitivaj iloj kaj improvizitaj loĝejoj montras klare ilian vivmanieron. La grandega akvofluo prezentis abunde da predo al la praa fiŝkaptisto, kaj troviĝis ĉirkaŭe multe da bestoj, do eblis vivteni sin facile jam tiutempe. Laŭ drivo de la fluo bone peliĝis la boate uzita, nur iom tajlita trunko; insuloj, eksaj fluejoj, arbustejoj certigis sekurecon al migrantoj. La sinsekvaj homgrupoj heredigis al ni multon, tiel informante nin pri komencoj de la homa historio, pri ŝanĝiĝoj de la evoluantaj vivmanieroj, kaj almontrante, ke la regiono de Danubo jam en la komencoj garde nutris siajn sovaĝajn filojn.

De du milionoj da jaroj, tra preskaŭ 3 mil km ruliĝas ondoj de Danubo en la maljuna Eŭropo, kaj formas de pratempoj naturan vojon inter Nigra maro kaj Okcident-Eŭropo. La vivon nutranta, riĉenhava riverego kaj iam, kaj nun grave kontribuis al la ekonomiaj kaj kulturaj interrilatoj de la pretere loĝantaj popoloj.

Arkeologiaj trovaĵoj atestas, ke sur Danubo jam dum la ŝtonepoko ekzistis trafiko. La 2860 km longa akvovojo servis kiel unu el la ĉefaj komercaj linioj en tiu regiono dum la antikveco, kaj tio ĝi estas ankaŭ nuntempe. Krome, en tiu 8 procenta parto de la kontinento ĝi kolektas la akvon kaj provizas per tiu la preterajn urbojn,

Navigacia kanalo en la Ferpordo (iama bildo)

vilaĝojn, industrion kaj agrikulturon. Neniam elĉerpebla estas ĝia energio, kiu kontribuas al la prospero de la ĉirkaŭantaj landoj.

La Romianoj movigis sur Danubo fortan militŝiparon, kiu ŝirmis la viglan komercan navigadon. Imperiestroj *Tiberio* kaj *Trajano* konstruigis vojon surborde ĉe la kataraktoj de la Suba–Danubo. Por faciligi la trapason ili konstruigis ankaŭ ŝtonan, lignan kaj flosan pontojn. En la 19a jc staris ankoraŭ ĉe Mehadia (Rumanio) la arkadoj de la ŝtonponto far la Romianoj.

Ankaŭ *Karlo* la Granda havis militfloton sur Danubo, kiu samtempe trafikis multaj komercaj ŝipoj. Li unua havis la ideon interligi Danubon kaj Rejnon. Ekzistas etaj restaĵoj de tiucela kanalo (Fossa Carolina) ekkonstruita en j. 793.

En la 9a jc Danubo servis kiel vojo al oriento. Kompreneble tiutempe la ŝipanoj devis lukti kontraŭ multaj danĝeroj krom la malsanoj, epidemioj, ĝis la celo estis finfine atingita. Malgraŭ la danĝeroj, la trafiko daŭre kreskis. Por treni ŝipojn, ĉ. 1350 oni ekuzis ĉevalojn anstataŭ homojn, kaj tiu maniero regis ĝis la vaporŝipoperiodo.

En flortempo de la feŭdismo, Danubo estis jam grava arterio de la Eŭropa komercado. Prosperis ĝiaj komercurboj, floradis metioj kaj gildoj. Kaj tamen, la kaprica fluo de la riverego ankoraŭ ne estis regulita.

Kiam *Marsigli,* italdevena armea ingeniero ŝipveturis ĝis fino de la rivero (17a jc), li trovis ĝin en preskaŭ sovaĝa stato. Lia scienca priskribo, vera monografio pri Danubo, plenas je indikoj hidrologiaj, geografiaj kaj navigaciaj. La insuloj, travadejoj, sablobenkaj kaj la nezorgitaj meandroj okaze de kruelaj vintroj foje haltigis la naĝantajn glacirompaĵojn. La tiel kaŭzitaj glaciaj inundoj – skribas la kronikoj – faris egajn damĝerojn.

Eminentaj scienculoj komencis esplori kaj priskribi la geografiajn cirkonstancojn en Hungario. Mateo *Bél* lasis al la posteuloj detalplenan bazan verkon, la unuan priskribon de la Hungarlandaj regionoj. Li publikis fidele la „vivon" de la fluoj, ties drivliniojn, kaj tion feliĉe kompletigis perfektaj mapoj de la multflanka inĝeniero Samuel *Mikoviny*. De li postrestis ankaŭ la unua moderne prilaborita projekto pri akvoregulado de Hungario.

La epoko de imperiestro *Jozefo* la 2a estas nomebla la periodo de la teknika eksvingo. Li iniciatis la Ĉefdirekcion de Hidrologio kaj Konstruado, kiu funkciis inter 1788–1876. Al ĝiaj plej gravaj taskoj apartenis la kontrolo de la hidrografiaj mezuradoj, kaj la preciza mezurado por la impe-



Marmorputo en palaco de reĝo Matiaso, Visegrád

Szigetvár ĉirkaŭita per marĉo, dum turka sieĝo en 1566

ria mapo. Dum apenaŭ 20 jaroj efektiviĝis la mapado de la tuta Hungarlando. Sekvante tion komenciĝis la tutlanda akvoregulado.

Tiu laboro bezonis nepre fakulojn. Je propono de la imperiestro estis fondita en 1782 la „Institutum Geometricum" por eduki inĝenierojn – siatempe unika en Eŭropo. En tiu eminenta altlernejo formiĝis tiuj inĝenieroj, kies tasko estis la regulado de sovaĝaj akvoj kaj riveroj, la drenado de marĉoj, limanoj, inundareoj, kovrantaj plurmilionojn da hektaroj. Trafe estis dirita pri la inĝenieroj, kiuj direktis la grandiozan akvoreguladon, ke kun la aro da terlaboristoj ili grave „modifis" la mapon de Hungario.

La tuto de la rivermezuraj rezultoj, nomata „Danub-mapacio", estas plenumo de nur du jardekoj, fare de la elstaraj inĝenieroj. Mátyás *Huszár* direktis la mezuradon en periodo 1823–1829, lin sekvis Pál *Vásárhelyi* (1830–1835), kaj Ottó *Hieronimy* (1836–1840). Vásárhelyi faris la sekcio-kartojn de la Budapeŝta etapo de Danubo dum kio li alvenis al gravegaj hidrometriaj ekkonoj. Pere de mezuroj sur punktoserioj en la sekcaj areoj, li difinis la leĝon de la rapido-distribuo, kaj unua en la mondo li desegnis kurbon de akvodebito. Al lia genio estas atribuebla la determino de l' akvonivela nulpunkto, kiu koincidas kun la stabila nivelo de Adriatiko.

Dum jarcentturno de la 18a, la plej ampleksa Hungarlanda teknika konstruado estis la realigo de la Kanalo Francisko. Tiu daŭris dum 1773–1801 en kiu József *Kiss* akiris la ĉefajn meritojn. La ekonomian gravecon de la kanalo bone pruvas, ke dum 1802–1818 dek miloj da kargoŝipoj transportis tra ĝi grenon, salon kaj aliajn terproduktaĵojn de Tiso ĝis Danubo, krome trapasis ankaŭ 4900 ŝipoj senkargaj.

Ankoraŭ en la 18a jc estis lanĉita ideo pri kanalsistemo inter urbo Szolnok kaj Budapeŝto por trafikado. Ĉiuj elstaraj inĝenieroj okupiĝis pri tiu nova akvovojo: Antal *Balla* jam en 1791, István *Vedres* faris planojn en 1805, József *Beszédes* poste en 1836 revivigis la ideon, kiu igis agi ankaŭ István *Széchenyi.* Estis li, kiu unua ekkonis la ekonomian signifon de la Danuba navigado, ties politikan kaj internacian gravecon: malfermi pordon al oriento por komerci kun la apudriveraj popoloj.

Széchenyi kaj Beszédes en 1830 finveturis la riveregon per la ŝipeto „Desdemona", kaj surbaze de la spertitaj, li persiste ekluktis celante la reguladon de la Suba Danubo. Inter aliaj li ankaŭ traktadis diplomatie en la apudriveraj ŝtatoj. Li iĝis reĝa komisaro de tiu regulado, la teknikan direktadon la ŝtato konfidis al Vásárhelyi.

La realigo komenciĝis en 1833, per likvidado de la plej gravaj obstakloj rilate la navigadon. Samtempe estis konstruita bona vojo sur la maldekstra bordo – malfermiĝis do la „pordo al oriento", la komerca komunikado en direkto de Rumanio, Bulgario, Turkio, Ruslando. La unua vaporŝipo la 14an de aprilo 1834 trapasis la preparitan, nun jam sendanĝeran akvovojon en la *Ferpordo.*

Dum miljaro de la hungara historio la kronikistoj jam en la komencaj jarcentoj, dum la dinastio Arpad devis registri gravajn detruojn de la grandaj riveroj. Danubo brute ofte misbalais sur la bordoj, kaj kaŭzis pezajn katastrofojn precipe per glaciaj altondoj. Manke de regulado multiĝis la sedimentaj benkoj, kreiĝis misaj fluujformadoj, kaj egaj meandroj malhelpis la rapidan forfluon de la altakvoj. Teknike fundita, science subtenita inundprevento ĉe Danubo komenciĝis nur en la 19a jc. Unueca inundprotekta linio unuafoje inter Paks kaj Báta konstruiĝis en longo de 21 km, far Beszédes. Li mallongigis la iam 40 km longe serpentumantan riveretapon je 6,5 km pere de kvar tratranĉoj, kaj la konstruita digo protektis 100 000 hektarojn da abunde produktaj kampoj.

La glacia altakvo, inundinta Budapeŝton en 1838, estis averto por ekreguli la urbon transirantan riveron. Bedaŭrinde nur en 1870 ekis la granda regulado, kiam Lajos *Bozóky* ricevis komision por elkonstrui la inundpro-



Fortikaĵo Ecsed, meze de marĉo, 17a jc



Ercrompilo movata per akvo en la mezepoko

tektan linion ĉe la ĉefurba Danub-etapo. Sub lia direktado konstruiĝis la granda kaj longega kajo, kiu en si mem servis kiel inundprotektilo. Sude de Monto Gellért la riverbranĉo „Soroksár" estis fermita, la fluujo malvastigita, per skrapmaŝinoj oni forigis benkegon el la fundo, la riverfluujon pliprofundigis, sekve la altondoj pli rapide povis forflui de la ĉefurbo. Ĉe la Hungarlanda supra Danubo inter 1885–1896 estis regulita la etapo inter Pozsony (nun Bratislava) kaj Komárom (Komarno), kaj tiel, kune kun la ĝisnunaj modernigoj, fortikigoj, la longo de la Danubaj inundprotektaj linioj atingas la 1400 km-ojn.

La sekura navigado necesigis kontinue mezuri la rivernivelon. Kompreneble ankaŭ la inund-prognozon ebligis nur regule plenumitaj nivelmezuradoj. Depost 1823 en oficiala registrolibro estis notitaj la indikoj de la nivelmezuriloj, kiuj poste estis telegrame raportendaj al la centra registrejo. De 1895 regule aperas tagaj kartoj pri la hidrologia reĝimo, kaj tiel la akvomastrumaj oficejoj, la inundprotektaj servoj daŭre ricevas fidelan spegulon pri la moviĝoj de Danubo, pri hidrologiaj fenomenoj.

La ekspozicio klare prezentas – krom la reguladoj kaj inundprotektadoj efektivigitaj ĉe Danubo – ankaŭ la teknikajn-ekonomiajn faritaĵojn por la utiligo de la abunda riverakvo. Ĝi informas la vizitantojn kiel antaŭeniĝas la energioproduktado, la sekura kontentigo de l' akvobezonoj en kadro de la kompleksa utiligo de Danubo.

Ĉio ĉi estas realigebla nur surbaze de grandiozaj laboroj. Ĉiu apud-Danuba lando okupiĝas pri kreado de akvocentraloj, kiuj ebligas akordigan utiligon de la avantaĝoj el la kompleksa riveruzo. La vicon de la jam konstruitaj Danubaj ŝveligaj digoj pliigas la kooperado hungara–ĉeĥoslovaka por la akvonodo ĉe Gabĉikovo–Nagymaros, kies konstruado jam komenciĝis. La vizitantoj de la muzeo povas ankaŭ ties modelojn jam studi.

2. Pri akvomastrumado ĝenerale

Pri la tuta akvomastrumado prezentas la ekspozicio multe por sentigi la grandan signifon por la landa prospero alportitan de la grandaj hidroteknikaĵoj. Kiel komence jam estis menciite, ties historio reiras ĝis la Romia epoko, kiam por la urboj kaj legiaj tendaroj oni zorgis pri abunda akvo kaj puraj fontoj. La akvon oni alkondukis pere de akvoduktoj, fermitaj aŭ malfermitaj, alte aŭ profunde kondukitaj kanaletoj. La strataj kloakkanaloj, fermitaj aŭ malfermitaj, la surplacaj aŭ en vilaoj faritaj akvumitaj necesejoj servis por la pureco. En la publikaj banejoj malvarma, varma kaj varmega akvo cirkulis en la duktoj. Tiaj akvaj – sanitaraj – instalaĵoj estas konataj el pluraj Transdanubiaj domrestaĵoj de la Romia epoko (Savaria, Baláca k.a.), kaj la ekspozicio elmontras originalajn akvoduktojn, tubojn kaj fotojn.

En la ŝtorma periodo de la popolmigrado pereis ankaŭ la altnivelaj teknikaĵoj de la Romianoj. Poste jam nur el epoko de la hungara reĝlando restis spuroj en dokumentoj pri tiamaj kontraŭinundaj digoj, muelfosaĵoj, muel– kaj fiŝlagoj. La dokumentoj rekondukas la vizitantojn ĝis la 11a jarcento.

La akvoprovizado estis jam sufiĉe altnivela en la 15a jc, kaj ne nur en la palacoj de reĝoj Sigismundo kaj Matiaso, sed ankaŭ en kasteloj de riĉaj aristokratoj. En la reĝan palacon en Buda, la akvo estis kondukita tra ceramikaj kaj lignaj tuboj disde cisternoj, konstruitaj sur la Monto Széchenyi. Kelkaj originalaj pecoj de tiuj instalaĵoj ankaŭ estas videblaj en la ekspozicio.

Inter la unuaj homaj intervenoj en la vivon de l' akvoj okazis la instalado de akvomezuriloj. Daŭra kaj regula observado de la riverniveloj, krome ties registrado, komenciĝis jam antaŭ pluraj jarcentoj. En la ekspozicio desegnoj kaj fotoj de malnovaj nivelmezuriloj atestas tion, ankaŭ modelo de malnova nivelmezurilo.

La turka okupado rompis la esperigan evoluon ankaŭ tiurilate. Mem la

Terlaboristoj en la 19a jc

Pál Vásárhelyi, inĝeniero



József Beszédes, inĝeniero

turkoj nur la banejojn konservis, kaj konstruis novajn por plenumi la riton, sed ĉion alian ili detruis. Multloke ĝusreformperiodo metis sur tagordon ankaŭ la neglektitajn hidroteknikajn taskojn, ja, sen tiuj tute vane oni atendus reordigon de la agrokulturo, industrigon, des malpli kreon de aparta komercado kun fremdlandoj.

La tiamaj drenadoj, inundprotektadoj, regulado de akvoj, riveroj, transformis tutajn landpartojn. Ne ŝenmerite titolas kelkaj la priakvajn plenumojn de la reformepoko: la dua patrujokupo.

La ekspozicio fidele montras la sovaĝajn, akvumitajn pejzaĝojn en la postturka epoko, kaj aliflanke la rezultojn de la poste faritaj grandiozaj reguladoj, elstaraj eĉ el Eŭropa vidpunkto. Kartoparoj – de antaŭ la regulado kaj de la nuna situacio – ebligas kompari la egan diferencon. Tiamaj „marĉaj" nomoj de iuj regionoj memorigas nur pri la forpasintaj grandegaj marĉoj.

Dum pli ol cent jaroj estis efektivigitaj grandegaj hidroteknikaj laboroj. Ilian grandecon prezentu kelkaj ciferoj: konstruiĝis (rondcifere) 2000 km da nova fluujo, 4500 km longe kontraŭinundaj digoj, 35 000 km da kanalizacia reto. La ekonomiaj kaj sociaj efektoj manifestiĝis en ekflorado de la agrikultura produktado, plibonigo de la trafiko, disvolviĝo de loĝlokoj en sekuro ktp.

La vizitantoj konatiĝas krome ankaŭ kun tiuj elstaraj inĝenieroj, laŭ kies projektoj kaj planoj realiĝis la supraj. Estis ekspoziciitaj inĝenieraj instrumentoj el la 18a kaj 19a jarte hungaroj detruis la kontraŭinundajn konstruaĵojn, ĉar la akvoj, la marĉoj defendis plej sekure la loĝantojn de la Granda Ebenaĵo. Sekve, post liberiĝo desub la turkoj, grandaj teritorioj estis kovritaj de akvo, kaj la lando estis en similaj, aŭ eĉ en pli kruelaj cirkonstancoj, ol dum la ŝtatofondo. Vastegaj kampoj troviĝis nekultivataj, la vojoj neniiĝis. Por longdistanca trafiko ekzistis sole Danubo, sed eĉ tion fermis oriente la kataraktoj de Ferpordo. Kvankam en la 18a jc la greneksporto povus ebligi korektadon de la aĉa ekonomia bilanco de la lando! Vane venis intencoj por dreni la marĉojn, konstrui kanalojn, akvovojojn, la lando kapablis nur la plej elementajn farendaĵojn plenumi.

Post la mallonga ekonomia prospero, kaŭzita de la Napoleonaj militiroj, tamen eksplodis la krizo, kiu kondukis al la reformmovado. Komenciĝis la luktado por likvidi la feŭdan reĝimon, kaj tiu kulminis en la nacia revolucio (1848) kaj en la milito por sendependiĝi de la Habsburgoj. La centoj, tiutempaj lerno- kaj manlibroj de inĝenieroj – kaj kelkaj ŝipmodeloj. Inter ili: la ĉarpentita ŝipeto „Desdemona", kiun konstruigis Széchenyi, kaj uzis por veturi kun Beszédes al la Ferpordo, ekkoni tie la regulindajn.

La imponaj hidroteknikaj plenumoj de la 19a jc fondis la sisteman kaj kompleksan akvomastrumadon, tamen ties disvolviĝo pur post 1945 komenciĝis. Tiu mastrumado etendiĝis jam grave al la utiligo de l' akvoj, kaj estas kune montrata ĉi tie kun skizado de la plua evoluo.

La diversaj tabuloj, diagramoj vidigas klare la grandan prosperon en la branĉoj de la akvomastrumado depost la liberiĝo. Aparte kaptas la atenton tiu sekcio, kiu informas pri la mekanizado, vere saltmaniera, de la terlaboroj; la iam preskaŭ nur permane faritaj laboroj hodiaŭ plejparte fariĝas per maŝinoj, ŝovelilo kaj ĉareto jam esceptas.

Tradukis: E. *Fenyvesi*

La „Institutum Geometricum", iama inĝenier-lernejo



Ukraina popola anekdoto

Du vilaĝanoj paroladas sur la strato. Unu rakontas; alia aŭskultas.

– Iam mi estis en Poltava.

– Kion vi faris tie?

– Mi aĉetis sakon da pizoj.

– Bona afero.

– Jes, bona; sed ne tre.

– Kial?

– Ĉar mi vizitis kelkajn drinkejojn[2], mi trinkis – eĉ drinkis – dek-dekdu glasojn da brando[3]; kaj kiam mi revenis, mi estis iom ebria, kaj falis sur la strato kun mia sako. La pizoj diskuris sur la tero.

– Malbona afero!

– Malbona, sed ne tre!

– Kial?

– Ĉar ne ĉiuj pizoj falis el la sako. Multaj el ili restis en ĝi, kaj mi plantis tiujn pizojn en mia ĝardeno, kaj ili bone kreskis.

– Bona afero.

– Bona, sed ne tre.

– Kial?

– Ĉar la porko de mia najbaro enkuris en la ĝardenon, kaj difektis la tutan plantaĵon.

– Malbona afero.

– Malbona, sed ne tre!

– Kial?

– Ĉar mi prenis mian tranĉilon kaj buĉis[4] la porkon. El ĝia karno[5] mi faris bonajn ŝinkojn[6], kolbasojn kaj porkaĵojn.

– Bona afero!

– Bona, sed ne tre!

– Kial?

– Ĉar en iu tago, la hundo de la vilaĝa pastro[7] enkuris en mian domon; ĝi saltis en la kuirejon kaj formanĝis la ŝinkojn, kolbasojn kaj porkaĵojn.

– Malbona afero!

– Malbona, sed ne tre!

– Kial?

– Ĉar denove mi prenis mian tranĉilon, mortigis la hundon, kaj faris el ĝia felo belan peltomantelon[8] por mia edzino.

– Bona afero!

– Bona, sed ne tre!

– Kial?

– Ĉar en la posta dimanĉo, mia edzino iris al la preĝejo kaj tie, la pastro rekonis la felon de sia hundo en ŝia pelto, kaj li forprenis ĝin de mia edzino.

– Malbona afero!

– Malbona, sed ne tre!

– Kial?

– Ĉar por plendi mi iris al la juĝisto, kaj, en la tribunalo[9] oni kondamnis[10] la pastron. Li devis redoni la pelton al mia edzino.

– Bona afero!

– Bona, sed ne tre!

– Kial?

– Ĉar por gajni la proceson[11], mi devis donaci ion al la juĝisto, kaj mi donis al li mian bovinon.

– Malbona afero.

– Malbona, sed ne tre!

– Kial?

– Ĉar mia bovino estis jam treege malsana, kaj, post unu semajno ŝi mortis en la stalo[12] de la sinjoro juĝisto.

El „Kursa lernolibro" de E. Privat
Represita el „Juna Amiko"

1. mallonga kaj sprita rakonto / 2. drinki: trinki ebriigan trinkaĵon senmezure / 3. forta senkolora drinkaĵo / 4. mortigis beston / 5. la sub-haŭta molaĵo de vivuloj / 6. ŝinko: femuro de porko / 7. religiulo / 8. pelto: prilaborita felo, mantelo: longa supra vestaĵo sen manikoj / 9. juĝejo; juĝistaro / 10. juĝe konstatis ies kulpecon / 11. proceso: juĝo-afero / 12. bestejo, ĉi tie: bovejo

Ridu kun ni!

Kaj edzo ĝentila...

– Karulino, mia sola deziro estas, ke mia *sekvonta* edzino estu simila al vi!

... eĉ rilate la poŝton(!)

– Mi ricevis post kvarmonata malfruo tiun leteron kun malbona sciigo!

– Skandalo!

– Tute ne! Mi sendis dankon al la poŝto.

Eble jam tio efektiviĝis?

– Mi jam kuiris la tagmanĝon por mia edzo, ho mi distrulino, kiam mi ekmemoris, ke mi jam ne havas edzon...

Tamen ekzistas la amo

– Ĉu vi jam parolis kun mia edzino – svatanton demandas patro.

– Jes, sinjoro, sed mi preferas resti ĉe via filino.

Ĉu samideano?

– Ni dankas vian viziton, samideano, sed estas jam malfrue, kaj tiuhore ni kutime jam enlitiĝas...

– Faru tute trankvile, iom mi restas ankoraŭ...

Oficisto tro ĝentila?

– Kiam ajn mi venas en vian ĉambron – diras ĉefo – mi trovas vin ĉiam telefonanta...

– Nur negocaj interparoloj, sinjoro, kun niaj klientoj.

– Bone, tamen alifoje ne titolu niajn klientojn *mia koreto, nek pupinjo!*

Szilárd Bálint

La fidela edzo

Karlo en Bologna sanĝis trajnon kaj serĉis sidlokon en la rapidvagonaro al Rimini. La kupeoj estis plenplenaj, eĉ multe da homoj staris ĉe la fenestroj de la vagono sur la mallarĝa koridoro, kaj ili gapadis la lunluman nokton. En la mezo de la koridoro iu kupeo estis fermita kaj kovrita per kurteno. Kelkaj homoj frapis la pordon, sed sen sukceso, fine alta viro vokis la konduktoron, kiu malfermis la pordon.

Ĉe la fenestro sidis viro havanta nigrajn lipharojn, apud li blonda virino klinis la kapon sur la ŝultron de la viro. La alta viro eniris kaj sidiĝis ĉe la angulo de la kupeo, kaj la pordo restis malfermita. Karlo iom pensadis, poste ankaŭ li sidiĝis vidalvide al la alta viro. Post nelonga tempo la lipharulo petis pardonon pro la fermita pordo, dirante, ke ili geedziĝis antaŭ du tagoj. La du fremduloj tuj mildiĝis kaj diris, ke tio klarigas la situacion.

Antaŭ iu stacidomo la trajno neatendite haltis. Laŭtparolilo anoncis, ke pro relrompiĝo ĉirkaŭ unu horon la trajno devos restadi ĉi tie, dum tiu tempo eblas forlasi la vagonojn. La juna edzo karesis la vizaĝon de la edzino kaj diris:

– Mia karulino, mi proponas, ke ni iru vespermanĝi...

– Volonte ... se vi volas ... – respondis la virino kaj reveme rigardis al la viro.

La alta viro elvagoniĝis kun la kofroj, dirante, ke li vojaĝos plu per taksio. La geedza paro lasis ĉion en la vagono, nur la viro prenis brunan aktujon, kaj brako en brako ili iris al la restoracio. Karlo postrigardis ilin, li preskaŭ neniam vidis ĉi tian belegan, sveltan virinon, kiu ame sin premetis al la talio de la viro.

Pasis la tempo kaj la pasaĝeroj ùnu post la alia revenis en la vagonojn, sed la novaj geedzoj ne alvenis. Karlo pensis, ke ili verŝajne forgesis la numeron de la vagono, kaj ili eniris en alian vagonon. La trajno ekiris, sed la juna paro estis nenie. Post sufiĉe longa tempo aperis la blonda virino, kaj en ŝiaj bluaj okuloj brilis larmoj. Ŝi enrigardis la kupeon, kaj tuj iris plu.

Karlo postrigardis ŝin kaj vidis, ke la virino malespere enrigardas la kupeojn laŭvice, kaj komencas laŭte plori. Iu el la kunvojaĝantaj virinoj demandis de ŝi, kio okazis?

– Mia edzo ... mia kara edzo ... malaperis, haltigu la trajnon, mi volas elvagoniĝi ... mi devas serĉi lin!

Kelkaj kunvojaĝantoj trankviligis ŝin, sed la virino restis nekonsolebla, ploris kaj kriadis plu. Antaŭ la relrompiĝo la trajno denove haltis. Apud la reloj staris traklaboristoj, ili donis permeson por la pluiro. La trajno ekiris, kaj tiam mallaŭta krio kaj obtuza falego estis aŭdebla, kaj la virino sterniĝis sur la relvojtaluso. En tiu momento Karlo saltis el la moviĝanta trajno.

Komencis mateniĝi. La adiaŭon dirantaj radioj de la luno dispersis palan lumon sur la blankan vizaĝon de la blonda virino, kies brustoj ondis pro la rapida spirado. Ŝi rekonsciiĝis:

– Kie mi estas ... kie troveblas mia edzo?

– Restu trankvile ... ni kune reiros al la stacidomo, kie verŝajne restis via edzo! Prenu mian jakon, ĉar la aero estas malvarmeta! – diris Karlo.

– Kore mi dankas pro via sinofero ... mia edzo certe estos dankema pro via bonvolo al vi!

Malrapide ili iris preter la reloj, dumvoje abrupte preterkuregis ilin eksprestrajno. Alveninte al la stacidomo, ili tuj serĉis la staciestron, kiu dormeme aŭskultis la aventuran historion kaj dume kompreneme kapbalancis.

– Kara sinjorino ... tute ne anonciĝis ĉe mi sinjoro, kiu estus serĉinta sian edzinon ... sed mi telefonos al Rimini, eble li forveturis per la eksprestrajno!

La telefonrespondo estis surpriza, neniu anonciĝis ĉe la stacidomo Rimini. La juna virino laŭte ploregis kaj ripetadis, ke ŝian edzon certe trafis akcidento. La staciestro trankviligis ŝin, dirante, ke li ricevis nenian informon pri akcidento. Post du horoj ili forveturis al Rimini, kie ili denove interesiĝis, sed sen sukceso. Fine la ploranta virino diris al Karlo:

– Mi dankas vian helpon, sed mi petas vin, ke vi ne forlasu min ĝis tiam, kiam mi trovos mian adorindan edzon!

– Kara sinjorino ... tiu faro estas homa devo ...

En la stacidomo, post pruvado de la posedrajto, ili ricevis ĉiujn pakaĵojn, kaj per taksio trovis hotelon, kie ili luis du apartajn ĉambrojn unu apud la alia. La hotelservistoj supozis, ke ili estas nuptovojaĝantoj, kaj miris, kial ili ne loĝas en sama ĉambro, ja cetere ili preskaŭ ĉiam kunestis. La viro komencis inklini al la junulino, kiel fero al magneto. La unua semajno forpasis tiel, ke ili vizitis longajn hotelvicojn apud la marbordo, sed nenie ili trovis la malaperintan edzon. La virino estis malgaja kaj ofte ploris. Foje ŝi diris:

– Kun mia edzo ni ege amas unu la alian. Miaj gepatroj oponis nian geedzecon, kvankam Petro estas inĝeniero, kaj ĝentila, bonega homo. Tamen ili donis al ni grandan monsumon – ĉirkaŭ cent mil forintojn – kiun mia edzo ĉiam kunportis en sia bruna aktujo ...

En la kapo de Karlo reviviĝis stranga penso. Unue li bedaŭris ŝin, sed poste jam enamiĝis al la bela blonda junulino. Tamen li eĉ unuvorte ne volis amindumi al la edziniĝinta virino, kiu havas fidelan edzon. Li tute ne volis iniciati aventuron ĝis li konvinkiĝos pri la praveco de la suspekto, kiu leviĝis en li. Tial li proponis, ke ili kune iru al la policejo por anonci la malaperon. La policoficiro faris protokolon, poste li montris dikan albumon plenan de fotoj por trarigardi. Ĉe la oka paĝo la virino ekkriis:

– Tiu viro estas mia amata edzo!

– Kara sinjorino ... tiu viro estas plurobla bigamiisto, internacia ĉarlatano ... ĝis nun dek fojojn li edziĝis en diversaj landoj, uzante diversajn no-

mojn kaj post kelkaj tagoj li malaperis kun la ricevita doto. Depost jaroj la internacia polico persekutas lin, sed vane ...

La juna edzino senvorte svenis.

Kara Leganto! Mankas la fino de tiu novelo, tial la redakcio petas vian helpon. Kion faris poste Karlo kaj la blonda junulino? Bonvolu sendi ne pli ol 30 tajpitajn liniojn. La plej bona solvo estos premiita kaj la teksto aperos en HV.

DAŬRIGO
de la historio
LA DEFRAŬDANTO
aperinta en n-ro 1979/5

Ĝia aŭtoro estas Marthe Jungton, F. Montmagny, Groufre Scolaire „Frères Lumière". La premion ni jam alsendis.

... – Mi proponas al vi, ke ni revojaĝu al Vieno, poste ni ekvidos la tutan situacion... – ekparolis unue Adelaida.

– Se hazarde, tamen restis iom da dokumentoj pri mia faro?

– Laŭ la gazeto certe ne...

Preskaŭ dum la tuta nokto ili diris diversajn proponojn unu al la alia en la komforta lito de la hotelo. Fine la postan tagon ili forveturis al Vieno. Dum la vojaĝo en la sama kupeo sidis tre ĝentila juna fraŭlo, kiu multe rakontis pri la belecoj de diversaj landoj, menciinte ke li heredis grandan sumon, kaj tiamaniere li havas eblecon ofte vojaĝi. Intertempe li petis Roberton, ke ili gardu la pakaĵojn dum li vespermanĝas en la restoracia vagono. Kiam li revenis, Roberto kaj Adelaida iris manĝi. Poste dum horo ili vigle paroladis, fine la fraŭlo elvagoniĝis, transdonante sian adreson.

Alveninte Vienon Roberto komencis elpaki la valizojn. En tiu kofreto, kie estis la mono, anstataŭ tio restis nur slipo kun teksto: „Karaj Gesinjoroj, kore mi dankas la monon por mia plua vojaĝo. Mi sciigas al Vi, ke mia adreso estas falsa! "

– Kiom da mono restis? – demandis la virino.

– Mil ŝilingoj en mia poŝo... – respondis la terurita viro.

En la posta tago ili kune iris al la komerca entrepreno. Tie ĉiu kontoro estis ŝlosita kaj sigelita, nur en unu ĉambro laboris la inventara kaj likvida komitatoj. Ili anonciĝis, dirante, ke iliaj libertempoj finiĝis. Ili ricevis unumonatan salajron, kaj estis maldungitaj.

LEHEL

H60F ✱✱✱✱

MASTRUMA FROSTIGUJO



Produktas: HŰTŐGÉPGYÁR JÁSZBERÉNY

Ridu kun ni!

... eĉ inter tulipoj

– Ĉu vi amas min? – sufloras tulipo al la alia.
– Treege kara!
– Do voku la abeleton...

Ne nur humuristo mistrafas

Grafo tro frue revenas hejmen de la ĉasado.
Grafino: Ĉu vi revenis por novaj kartoĉoj?
Grafo: Ne, por novaj hundoj...

Sensacio en la cirko!

„En la programo nia cirko prezentos 8 malsovaĝigitajn HOMOJN! ! ! "

Sensacio en la tribunalo

La profesia ĉarlatano ellogis 10 000 forintojn de sia advokato.

Bonega atestanto

– Sinjoro juĝisto, mi kristalklare memoras, ke mi ĉiam estis forgesema.

Nostalgia ondo jam ĉe la maŝinoj?

– Imagu, ĉefo, nia komputilo per ornamriĉa inicialo dekoracias la trukartojn...

HS 280 HiFi

SONRADIATORO
Tribranĉa elektroakustika aparato kun tri megafonoj
Nominala ŝarĝebleco 50 W
Muzika ŝarĝebleco 80 W
Zonamplekso de sonreprodukto 50–20 000 Hz
Frekvenco de rezonanco 65 Hz
Frekvencaj ampleksolimoj 700 Hz kaj 4 kHz
Impedancio 4 Ohm
Sontralasiva armaturo kun kovrilo de speciala jersey-teksaĵo



HS 500 HiFi

SONRADIATORO
Tribranĉa elektroakustika aparato kun tri megafonoj
Nominala ŝarĝebleco 80 W
Muzika ŝarĝebleco 100 W
Zonamplekso de sonreprodukto 40–20 000 Hz
Frekvenco de rezonanco 55 Hz
Sontralasiva armaturo kun kovrilo de speciala jersey-teksaĵo
Enmuntita defenda elektroniko, kiu ĉe maksimuma ŝarĝebleco ŝaltiĝas, kaj defendas la sonradiatoron de troŝarĝo



HS 700 HiFi

SONRADIATORO
Tribranĉa elektroakustika aparato kun kvin megafonoj
Nominala ŝarĝebleco 90 W
Muzika ŝarĝebleco 120 W
Zonamplekso de sonreprodukto 35–20 000 Hz
Sontralasiva armaturo kun kovrilo de speciala jersey-teksaĵo
Kun po unu lumemisianta diodo, kies eklumo signas la nominalan ŝarĝon efikantan al profunda, meza kaj alta megafonoj
Enmuntita defenda elektroniko, kiu ĉe maksimuma ŝarĝebleco ŝaltiĝas kaj defendas la sonradiatoron de troŝarĝo



Bernard Golden

ESPERANTO KAJ LA MAGNETOFONO

Nuntempe, la magnetofono, same kiel la radio- kaj televidaparato, estas nemalhavebla ilo de la ĉiutaga vivo. Eble estos surprizo por multaj legantoj ekscii, ke la unua sonregistra aparato utiliganta proprecojn de la magnetismo por registri kaj reaŭdigi sonojn estis patentita jam en 1898 fare de la dana radioinĝeniero Valdemar Poulson. Lia inventaĵo, la telegrafono, estis tre primitiva, kaj la mondo devis atendi duonjarcenton, antaŭ ol ĝi estis perfektigita. Sed antaŭ la estiĝo de tiu frua magnetofono, ekzistis aliaj teknikoj por konservi efemerajn sonojn de homaj voĉoj kaj muziko, kaj dum la fruaj jaroj de la Esperanto-movado, ili estis uzataj por registri la vortojn de kelkaj pioniraj esperantistoj.

La fonografo

La unua aparato, kiu atingis vastan publikan uzon, estis la fonografo, inventita en 1877 de la Usona elektra geniulo Thomas Alva Edison. La plej fruaj modeloj konsistis el vaksa cilindro, sur kiu la sono estis registrita en la formo de gravuraĵoj faritaj per pintigita nadlo.

Tiu sonregistra procedo estis uzita fare de esperantistoj la unuan fojon en Montrealo, Kanado. En 1902 ili sendis al d-ro Zamenhof fonografon kun la peto, ke per tiu aparato li donu al ili lecionojn pri la modela prononco de Esperanto. Samtempe ili sendis al li por komparaj celoj du cilindrojn kun elparoladoj en Esperanto, unu de angleparolanta Kanadano, la alia de parolanto de la franca lingvo. Tio ne estis la sola okazo, kiam d-ro Zamenhof registris sian voĉon per la fonografo. Li uzis tiun teknikon por saluti la membrojn de la Londona Esperanto-Klubo la 12-an de januaro 1904, kiam ili festis la unuan datrevenon de la fondiĝo de tiu grupo. Bedaŭrinde, tiuj historie valoraj cilindroj jam de longe malaperis.

Povas esti, ke d-ro Zamenhof tro ofte uzis sian fonografon. En poŝtkarto datita 30.03.1904 kaj adresita al la franca advokato Alfred Michaux, li bedaŭras, ke li ne povas sendi fonografan cilindron kun sia voĉo, ĉar lia fonografo „tute difektiĝis kaj oni jam ne povas ĝin rebonigi." En postskribaĵo de letero de 08.07.1908 sendita al Generalo Sébert en Parizo, Zamenhof denove mencias fonografojn, kiuj estis la temo de alia letero, kiun li sendis al John Fogg Twombly, la fondinto de la unua Usona Esperanto-grupo en Bostono.

En 1909, okaze de la 5-a Universala Kongreso en Barcelono, la kataluna aktivulo Alfons Sabadell kunvenigis en sian hejmon plurajn eminentajn esperantistojn kaj gravurigis iliajn voĉojn sur vaksaj cilindroj. Krom d-ro Zamenhof, ĉeestis tiun memorindan eventon Carlo Bourlet, Antoni Grabowski kaj Félicien de Ménil. En 1930 tiuj paroladoj estis transregistritaj de la originalaj, jam trivitaj vaksaj cilindroj, sur gramofondiskojn fare de d-ro Jacint Bremon, kuracisto en Barcelono, kaj en 1957 s-ro Santacana surbendigis la enhavon de la disko.

Laŭ Roland Jossinet, la plej perfekta Zamenhofa voĉregistrado okazis la 28-an de aŭgusto 1911 en Parizo tuj post la 7-a Universala Kongreso en Antverpeno. Zamenhof estis invitita pozi antaŭ la kameraoj de s-ro L. Gaumont, inventinto de la parolfilmo, kaj por tiu okazo li deklamis „Preĝo sub la verda standardo". Ankaŭ tiu registraĵo malaperis; eble ĝi estis intence detruita, kiam Gaumont vendis sian firmaon.

La gramofono

La gramofono naskiĝis kune kun Esperanto en 1887. Emil Berliner, germana inventisto laboranta en Usono, faris grandan plibonigon sur la inventaĵo de Edison, kiam li substituis al la vaksa cilindro de la fonografo platan diskon, turnitan per motoro. Baldaŭ la gramofono komencis anstataŭi la fonografon.

Laŭ *Enciklopedio de Esperanto*, en Esperantujo jam antaŭ la unua mondmilito estis produktitaj diskoj kun modelparoloj de Zamenhof kaj deklamaĵoj de Devjatnin, Bemberg kaj Privat. En la postmilitaj jaroj oni eldonis diskon kun pli varia enhavo: kantoj kaj muziko, kaj ankaŭ tutaj lingvokursoj. La parolanto de la fama Usona surdiska *Linguaphone*-kurso estis Edmond Privat. En la plej ĝisdata katalogo de la Libroservo de UEA (1977–1978), aparta sekcio pri sonreproduktaĵoj listigas ampleksan sortimenton de diskoj el pluraj landoj kun tre diversaj temoj: kantoj kaj kanzonoj, operaj arioj kaj religiaj himnoj, deklamado de poezio, ekzemploj de modela prononco kaj lingvokursoj. Sed la plej interesaj diskoj por tiuj okupiĝantaj pri la historio de la Esperanto-movado, estas tiuj, kiuj prezentas la voĉojn de elstaraj personoj, kiuj rolis kiel movadaj organizantoj aŭ kiel kreintoj de beletraĵoj: inter ili troviĝas Setälä, Lapenna, Yagi, Baghy, Kalocsay, Auld kaj Szathmári. Oni povas bedaŭri, ke la listo ne estas pli longa, kaj ni revenos al tiu ĉi temo poste. Necesas diri, ke la invento kaj adopto de la nova magnetofona sonregistrada procedo ne bremsis la produktadon de diskoj, kiuj ankoraŭ restas la plej populara formo de sonregistrado en Esperantujo.

La magnetofono

Kvankam la unua pramagnetofono datiĝas de fino de la 19-a jc, ĝi ne rapide disvastiĝis pro manko de granda fideleco en la reproduktado de sonoj, kiuj dum longa tempo estis limigitaj al tiuj de la homa voĉo. Speco de magnetofono, konata kiel diktafono, fariĝis populara en la 1920-aj jaroj, ĉefe por plifaciligi la diktadon de korespondaĵoj, kiuj ĝenerale estis registritaj per stenografio. Nur post la dua mondmilito la magnetofono perfektiĝis kaj rapide disvastiĝis. Estis do atendeble, ke esperantistoj favore akceptis tiun novan inventaĵon, kiun ili aplikis al la tradiciaj uzoj de la fonografo kaj gramofono, kaj ankaŭ al aro da novaj agadoj. Pluraj esperantistoj,

precipe blinduloj, interkorespondas per sonbendoj, kaj lastatempe plioftiĝis la magnetofona registrado de tutaj libroj por la uzo de nevidantoj. Apenaŭ okazas grava kunveno, konferenco aŭ kongreso en Esperantujo, kies programo ne estas eternigita sur magnetaj bendoj. Kaj la magnetofono rapide fariĝis unu el la plej gravaj modernaj aŭdvidaj lerniloj por stimuli la interesiĝon de lernantoj, instruante la bonan prononcon kaj ankaŭ ebligante al homoj, kiuj ne havas kontaktojn kun aliaj esperantistoj, la alkutimiĝon al la parolata konversacia lingvo. En la menciita katalogo de la Libroservo de UEA nun ekzistas por kelkaj titoloj la alternativo de disko aŭ kaseto, la plej oportuna formo de sonbendo, kiu komencis esti uzata en la fruaj 1970-aj jaroj.

Enkadre de la kulturaj kaj edukaj agadoj de UEA estas la Magnetofona Servo, fondita en 1957 kun Rüdiger Eichholz el Kanado kiel komisiito. La celo de la Servo estas kolekti sonbende registritajn prelegojn, radiodissendojn, kantojn, kursojn, teatraĵojn kaj ĝenerale interesajn sondokumentojn en aŭ pri Esperanto. Pli ol 300 sonbendoj estas haveblaj ĉe la Servo, kiu vendas kopiojn al la esperantista publiko. Dua kultura agado funkcianta en kunlaboro kun la Magnetofona Servo estas la registrado de la konversacia lingvo. La komisiito, Jim Deer el Usono, havas la taskon surbendigi neformalajn konversaciojn spegulantajn la vivantan parolatan lingvon en diversaj medioj kaj regionoj. Tiaj sontekstoj estos tre utilaj al lingvistoj kaj fonetikistoj dezirantaj science analizi la parolatan Esperanton por ekscii, kiel ĝi diferencas disde la skriba lingvo.

Malgraŭ la vasta gamo de materialo nun havebla per diversaj sonregistraj teknikoj, unu tereno ankoraŭ ne estas kultivita aŭ ĝis nun nur sporade, kaj pro tio ĝiaj riĉaĵoj ne estas haveblaj al la esperantistaro. Mi aludas la registradon de historiaj Esperantaj dokumentoj per la magnetofono.

Urĝeco de la tasko

En mia rubrika artikolo „Esperantisto de la Monato" aperinta en Budapeŝta Informilo (marto 1977) mi klarigis, ke mi iniciatis tiun rubrikon kun la celo instigi la esperantistaron kolekti vivhistorian materialon kaj rememorojn de elstaraj esperantistaj aktivuloj, antaŭ ol estos tro malfrue. Mi argumentis jene. Ĉiujare la nekrologoj en nia gazetaro atestas, ke la nombro de aktivuloj de la fruaj periodoj de la Esperanto-movado en pluraj landoj malplimultiĝas. La plimulto da ili ne verkis aŭtobiografiojn, nek postlasis alispecan dokumentadon en la formo de detalaj taglibroj, kolektoj de korespondaĵoj aŭ intervju-artikoloj. Kun la forpaso de tiuj homoj, perdiĝas multaj informoj pri la historio de Esperanto sur diversaj terenoj.

Kleruloj laborantaj en aliaj sciencaj kaj historiaj branĉoj, ekzemple historiistoj, etnografoj, lingvistoj kaj muzikologoj, alfrontas similajn problemojn, sed ili jam trovis la solvon. Kiam ili renkontas vivantan partopreninton de grava historia evento aŭ epoko, membron de etnografia aŭ lingvistika grupo, kiu scias multon pri la folkloro de sia popolo aŭ parolas nekonatan lingvon, tiuj fakuloj utiligas la magnetofonon por registri rapide kaj plendetale ĉion, kion la intervjuato povas memori. Leviĝas la demando: kial oni ne daŭre uzas tiun rimedon en Esperantujo? La sekva pritrakto de la situacio en nur unu lando montros, ke la afero meritas seriozan kaj tujan konsideron.

Grupo de amikoj de Kolomano *Kalocsay*, mortinta en februaro 1976, nuntempe kompilas memorlibron pri li. Laŭ la priskribo de la planita volumo, ĝi ne estos vera biografio, sed nur kolekto da dokumentoj pri diversaj aspektoj de la vivo kaj verkado de Kalocsay. Mi ja povas konjekti, pri la nombro de sonbendoj, kiujn tiu eminentulo estus povinta plenigi, nur babilante, kiel li kutimis fari, dum la neformalaj sabataj renkontiĝoj en sia Budapeŝta hejmo. Tiu registraĵo povus enhavi pli ol duonjarcenton da informoj kaj impresoj, ne nur aŭtobiografiaj, sed ankaŭ movad- kaj literaturhistoriaj. Sed jam estas tro malfrue, kaj la eldonota verko estos nur skizita kartono de tiu riĉe nuancita pentraĵo, kiu neniam estis farita. Kaj ne havas sencon *nun* demandi, kial Kalocsay mem ne verkis sian propran aŭtobiografion.

Mia indiko de la urĝeco de la situacio estas drameco substrekita en la sama numero de *Budapeŝta Informilo*: ĉe-metita en la revuo estis nigre borderita sciigo pri la morto de Paŭlo *Balkányi*, konata aktivulo de la hungara Esperanto-movado, en februaro 1977. Kaj kiu zorge legis la januaran numeron de la sama periodaĵo, sendube vidis la tristajn vortojn de Onklo Paŭlo mem, kiu, kušante grave malsana, skribis: „Jen mia lasta saluto al ĉiuj." Li travivis 65 jarojn da esperantisteco kaj diversloke surpaperigis siajn rememorojn pri kelkaj el la plej gravaj eventoj, kiujn li partoprenis aŭ iniciatis, sed eĉ se oni povus kunmeti ĉiujn tiujn fragmentojn, oni ne havus la tutan bildon. Samjare en junio forpasis Tibor *Ujlaky–Nagy*, internacie konata pro sia laboro super la sporta terminologio en Esperanto, kaj en novembro aperis la funebra anonco pri la esperantisto-muzikologo Lajos *Lesznai*. La listigo daŭris ankaŭ en 1978. Ludoviko *Márton*, la elstara juristo mortis en marto, kaj sekvis lin en julio Lajos *Tárkony/Totsche*, poeto kaj akademiano. Krom tiuj homoj, aliaj malpli bone konataj malnovaj hungaraj esperantistoj forlasis la scenejon por ĉiam. Ĉar mi ne legis ie en Hungarlandaj Esperanto-periodaĵoj pri individuaj aŭ kolektivaj reagoj al mia propono magnetofone kolekti donitaĵojn pri la vivhistorio de veteranaj esperantistoj, mi komencis malesperi.

Pozitiva agado

Lastatempe trafis en miajn manojn numero 90/4-1978 de *der esperantist*, la organo de la Amikoj de Esperanto en la Kulturligo de Germana Demokrata Respubliko. Kun miro kaj plezuro mi legis pri klopodoj entreprenitaj de Centra Laborrondo de Esperantistoj (CLE) por dokumenti la historion de la landa Esperanto-movado. La sekvaj vortoj estas citindaj (p. 4.):

> „Estas grave...ke la... esperantistoj nepre surpaperigu siajn memorojn... Plue necesas nepre certigi, ke neniu valora materialo perdiĝu (revuoj, fotoj, korespondaĵoj, libroj, dokumentoj ks.). CLE volonte akceptos ĉiuspecan materialon, retenos ĝin aŭ post fotokopiado redonas ĝin al la posedantoj."

Kaj la sekvan frazon oni devas substreki per duobla linio:

> „Cetere CLE pretas surbendigi memorojn, se iu veterano ne tro volonte skribas."

Finfine, iuj vidis la ĝustan vojon kaj ekiris. La konservado kaj registrado de ĉiuspecaj historiaj donitaĵoj de ankoraŭ vivantaj partoprenintoj en signifplenaj aspektoj de la historio de Esperanto estas tasko por ĉiuj en Esperantujo: internaciaj organizaĵoj, kiel UEA kaj SAT, kaj ankaŭ fakorganizaĵoj kaj religiaj grupoj, landaj asocioj, lokaj grupoj, universitataj fakoj pri Esperanto, fakdelegitoj pri sonbendoj – fakte, ĉiu esperantisto, kiu posedas magnetofonon kaj konas alian esperantiston, kiu havas ion gravan por rakonti. Eĉ intervjuoj en etnaj lingvoj kun eks-esperantistoj aŭ adeptoj de aliaj mortintaj planlingvoj (Volapuko, Ido, Occidental, Novial) povas alporti gravajn informojn. La labormetodo estas tre simpla. Oni samtempe šaltas la aparaton kaj la intervjuaton, kaj lasas lin rakontadi ĉion, kion li povas memori. Post transskribo de la teksto, oni povas kompari la enhavon kun aliaj fontoj por kontroli la precizecon de la donitaĵoj, kaj eventuale redakti la materialon por publikigi ĝin libroforme aŭ kiel artikolon. Tiu skriba dokumento preskaŭ verkas sin mem.

Poemoj de italino kaj polo

NUANCOJ – poemoj de Kazimierz Szczurek kaj Lina Gabrielli. Eld. Gabrielli, Ascoli Piceno, Italio. 125 p. 19x12 cm.

Denove venas komuna poemlibro de diverslandaj poetoj, kio cetere havas ne multe komunan inter ili, pleje la penstrafaj desegnoj de Z. *Józwik* kvazaŭ kunligas ambaŭ partojn per sama konvena stilo. La intimeco – aparta, en ĉiu senco de la vorto – de la poezio de Gabrielli jam estas konata al niaj legantoj. Jam publikitaj kaj novaj poemoj prezentas tie ĉi serion eĉ pli „nuancitan"; ŝiaj esprimiloj plidensiĝis, kaj poluriĝis tiel, ke en pluraj ĝi atingas jam epigraman miniaturecon. Nur ŝajne naivaj estas iuj laŭtone, malsurface rimarkeblas virine komplikaj direndoj, kiel en *Ĉielarkoj* aŭ en strofoj de *Jeŝe*. La sincera konfeso de profundaj sentoj pri amo, amperdo, animdoloro kapablas kapti la kunsenton de la leganto, kiun ne devas ĝeni tromkomplikaj frazoformoj, sed povas ĝui pri delikate stilitaj kaj fluaj vortĉenoj.

Ankoraŭ ne konata pola poeto Szczurek (eld. Ŝĉurek) debutas per tradukaĵoj kaj originalaĵoj. Certe ne temas pri novico de poezio, tion pruvas tuj la elvokiva manipulado de nia lingvo, la bonega rimado. Entrepreno kuraĝa ŝajnas traduki *Naskiĝo de Afrodita* de K. Tetmajer, plena da multkoloraj antikvecaj bildoj, kiun legi estas vera ĝuo kaj ne nur por parnasanojn ŝatantoj. Troveblas ankoraŭ kio estas perfektigenda en lia stilo, por esti iom pli frua – malglataĵojn kaŭzas ofte lia baraktado kun la artikolo, kio rezultigas apenaŭ digeteblajn vokalobstrukcojn (ekz. dum l' korpon; brakojn l' kolon) nepre evitindajn. Lia spirito drivas al la serioza, eĉ morala bordo, sed dirata de li estas ne malofte nur banala, kvankam elokventa; tia striktigo de la poezia paletro malkonvene paletigas la talenton, kapablan certe altiĝi sen tia balasto.

E. *Fenyvesi*

Kalejdoskopa rememorajo

Pietro Rizzo: Sesdek jaroj. Memuaro kaj artikoloj. Eldono de la aŭtoro, Pisa, 1979. 40 p. 23 cm.

Pri siaj 60 jaroj en Esperantio, tamen iom pretere, rakontas kalejdoskope la aŭtoro. Atentoveke kaj distre fluas aro da pli-malpli gravaj scenoj, kaj oni devas bedaŭri dum legado la mankon de la pliaj kaj pliabunde nuancitaj epizodoj. La movadhistorio bezonas ankoraŭ multajn epizodojn pri la okazintaĵoj, kaj ankaŭ priskribojn de siatempaj kialoj, kiu havas ĉiam la kutimon forfali antaŭ okuloj de la historiistoj. La ricevitan peton:

„Rakontu, samideano! " Rizzo plenumis en modesta sinteno de senofica, sed helpema kaj amikema intelektulo. Ni povas bedaŭri ankaŭ la malriĉecan prezenton de la multaj eminentuloj, pri kiuj cetere ni ricevas same nur iom palan bildon. Malgraŭ tio, ke la aŭtoro konfesas pri multaj travivaĵoj kaj spertoj ankoraŭ konigindaj, tamen ili estis el tiu memuaro forlasitaj! Eble ni ricevos iam ankaŭ tiujn.

Pli ampleksa parto restis por prilingvaj artikoloj, kolektitaj elinter la aperintaj en diversaj gazetoj. Temas pri seriozaj kontribuaĵoj al lingvaj debatoj, laŭ vidpunktoj de la lingvon – eĉ lingvojn – profunde studanta kaj realisme konsideranta observanto. La trafaj rimedoj ĝenerale – nun jam – akordas kun la publika opinio (skribado de nomoj), sed restis kelkaj, inter ili la problemo de la originala akcento, pri kiuj ankoraŭ ne regas konsento. Tamen ne komprenu la suprajn tiel, ke tiuj artikoloj malaktualiĝis. Ĉirkaŭ *vivanta* lingvo, ankaŭ pro la novaj generacioj, nove-denove ekvigliĝas la debatoj pri dubeblaj aŭ dubigeblaj punktoj. Nenion solvas, se oni kredas problemojn jam enterigitaj. Kiu tiel pasioplene ŝatas E-on kiel Rizzo, kaj rajtas kaj devas lanĉi siajn starpunktojn, enĵeti siajn ĝustajn analizojn en la diskutojn.

Ervin *Fenyvesi*

Simplaj, sed necesaj sugestoj

Herman Van Dyk: Ne tiel, sed ĉi tiel. Simplaj sugestoj por agrabla kontakto kun blinduloj. Eldonis: Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 1979. 32 p. 17 cm. Ilustrita. Prezo: 2,70 ned. gld.

Tiu ĉi broŝuro finiĝas per penso de A. de Saint Exupéry: „La esenco estas nevidebla per la okuloj ... oni devas serĉi per la koro" kaj tiuj ĉi vortoj rememorigas min, ke ni ofte tre supraĵe observas la fenomenojn de la vivo.

Ĉiam sincere kaj tutkore oni deziras helpi al la blinduloj, sed ofte anstataŭ helpi ni malhelpas, ĉar ni ne konas kelkajn gravajn postulojn por efika kaj senĝena helpo al vidhandikapitoj. La libreto de Herman Van Dyck proponas bonajn kaj necesajn sugestojn por nia homa kaj etika devo.

La aŭtoro ne nur analizas diversajn situaciojn en kiuj oni povas kaj devas helpi al la blinduloj, sed ankaŭ konsilas, kiel ĝuste agi en konkretaj okazoj. La sugestoj estas koncizaj, klaraj kaj trafaj ilustraĵoj akompanas ilin.

Post tralego de tiu ĉi libreto ĉiu sentos sin trankvila en siaj kontaktoj kun la vidhandikaptitoj.

La preciza stilo de la traduko faras la legadon de la libreto plezura.

Georgi *Mihalkov*

Genia poeto kaj genia tradukinto

Dante: Infero. El la itala tradukis K. Kalocsay. Kun postparolo de G. Waringhien. Represo de la unua eldono el 1933. Eldonis: Librofako de Literatura Foiro. La Chaux-de-Fonds (Milano,1979. 290 p. 24 cm. Prezo: 19,– svisaj frankoj.

Dante estas „la" taskego de ĉiuj poemtradukistoj, en iu ajn lingvo de la mondo. Kiu arogas al si traduki la versojn de la itala giganto, tiu fakte devas senti sin same aŭ preskaŭ tiel genia, kiel li mem estis. Kalocsay timis nek la egan laboron, nek la ŝajnon de malmodesteco: kiel lia hungara poetmodelo, Mihály *Babits*, li alfrontis la grandegan taskon, kaj ni povas nur bedaŭri, ke li plenumis nur unu trionon de la giganta laboro, kaj neniam revenis fintraduki la kompletan *Dian Komedion.*

Kio tiom malfaciligas la tradukadon de tiu verko? Nu, antaŭ ĉio la kombiniĝo de tri ĉefaj trajtoj, el kiuj jam unu sufiĉas ŝvitigi tradukiston: kunfandiĝo de filozofiaj pensoĉenoj kaj priskribo de aventura „vojaĝo", ĉio ĉi rakontata en tre komplika, malfacile regebla versoformo. Multaj tradukistoj – ne nur Esperantaj – de la Dante-a verko rezignis pri la rimoj, sed ne faris tiel Kalocsay! Li sukcesis konservi la originalan formon, submetante per tio la siatempan Esperantan poezian lingvaĵon al grandega kaj iom riska provo. Sed la lingvo, tiam havanta ankoraŭ nur vere malmultajn valorajn literaturaĵojn, en liaj manoj montriĝis ilo potenca kaj inda al la granda verko, kaj la Esperanta *Infero* verŝajne ankoraŭ kvindek jarojn poste restos inter la kvin plej bonaj tradukoj, kiuj ekzistas en la Internacia Lingvo.

La teknike bela represo de la traduko estas do tre bonvena. Meritas apartan atenton la pie omaĝa, sed samtempe utile instrua postparolo de Waringhien: li trafe prilumas la „metiejajn sekretojn" de kelkaj versoj de la traduko, multe helpante tiel al la neinicita leganto.

Multaj opinias, ke *Dia Komedio* ne estas legaĵo por la nuntempa homo; laŭ iu anekdoto jam Lope de Vega trovis ĝin teda, kaj ne kapablis legi la tuton. Nu, ĝi estas vere iom tro densa por gluti ĝin je unu fojo, sed se oni nur gustumetos ĝin poiome, kiel malnovan vinon, plenĝuante ĝian aromon, ĝi povos esti eĉ por la plej moderna homo fonto de plezurigaj kaj pensigaj leghoroj.

V. *Benczik*

Libro pri la Esperanta literaturo

Vilmos Benczik: Studoj pri la Esperanta literaturo. Eseoj. Eldonis: La Kritikanto (Mine Yositaka), Takasago (Japanio). 143 p. 20 cm. Prezo: 19,50 ned. gld. (Por Hungario 120,– ft-oj.)

La literatura kritiko kaj beletro neniam ekzistis aparte unu de alia. La valoraj verkoj naskas talentan literaturan kritikon kaj la reala kritiko stimulas talentan verkadon. Sufiĉas, ke ni menciu nur la rolon de V. Belinskij en la disfloro de la rusa literaturo.

Ankaŭ en la modesta Esperanto-literaturo ne mankis kaj ne mankas talentaj literaturaj interpretantoj. Inter la nomoj de Privat, Sturmer, Tárkony, Kalocsay, Auld viciĝas la nomo de Vilmos Benczik, la kritikisto.

Sian prelegon ĉe la Internacia Somera Universitato dum la 63-a UK en Varno, Vilmos Benczik finis per la vortoj: „... ĉiun mian demandon, ĉiun mian dubon naskis amo al tiu ĉi preskaŭ-jarcenta mirinda kreaĵo de la internacilingva movado." Kaj tiujn ĉi vortojn elokvente pruvas liaj multnombraj eseoj, recenzoj kaj lia ĵus aperinta verko „Studoj pri la Esperanta literaturo".

Libroj kiel „Studoj..." ne abundas en nia literaturo, kaj tial ĉiu nova, pli ampleksa verko, kiu pritraktas la problemojn de la originala Esperanta literaturo, vekas viglan intereson, ĉar ankoraŭ ne ĉesis kaj eble longe daŭros la skeptikeco kaj duboj pri la valoro



de la Internacilingva literaturo. Krom tio la literaturkritikaj verkoj penetras kiel radioj en la malunuecan Esperanto-literaturon kaj helpas al la legantoj pli bone orientiĝi en tiu ĉi juna, sed diverstema kaj diversproblema beletro.

La studoj kaj eseoj en la libro de Benczik atestas pri aŭtoro, kiu ne nur perfekte konas la Esperanto-literaturon, sed spertas detale, science analizi ĝin. Por Benczik la Esperanto-beletro ne estas fenomeno fermita en si mem, kaj tial li esploras ĝian specifon kaj karakteron sur la fono de la monda literaturo. Ekzemple en la eseo „La proza stilo en Esperanto" Benczik atentigas pri la influo de la stiltendencoj de la monda literaturo al la stiloj de la Esperanto-verkistoj.

Sur la bazo de la Esperanto-verkoj Benczik logike motivas kaj difinas la evoluon de la Esperanto-beletro, kaj kiel ĉefa pozitiva trajto, li taksas la „internaciismon", kiu formas kaj formos la karakteron de nia literaturo, kaj kiu levos ĝin ĝis la nivelo de la naciaj literaturoj.

En siaj literaturaj analizoj Benczik apogas sin sur la recenzoj kaj eseoj de la Esperanto-aŭtoroj, kiuj antaŭ li fosis la sulkon de la Esperanta kritiko. Sed male al Tárkony kaj aliaj kritikistoj, kiujn interesis ĝenerale la estetikaj demandoj de nia literaturo, Ben-

czik esploras la historiajn, sociajn kaj sociologiajn problemojn, esprimitajn en la Esperanto-verkoj. Ekzemple Benczik detale esploras la sociajn cirkonstancojn, en kiuj kreskis kaj vivis la Esperanto-verkistoj. Li profunde penetras en iliajn mondkonceptojn kaj ideologiajn principojn, kaj la konkretaj faktoj el la biografioj de la verkistoj helpas lin pli argumentite analizi ilian kreadon. Kiel modelo de la kritika analizo estas la eseoj pri Baghy, Emba, Szilágyi, Sadler.

La studoj de Benczik ravas per sia klara, scienca stilo. En sia esploro li uzas la metodojn de la moderna literaturscienco, kaj de nova vidpunkto li alrigardas la Esperanto-literaturon.

Li estas objektiva esploranto, kiu reale, sed ne senpasie pristudas nian junan literaturon. Li atentigas nin pri ĝiaj pozitivaj trajtoj kaj montras ankaŭ ĝiajn mankojn kaj malsukcesojn.

En unu el siaj studoj li skribas: „Kaj ĉar temas pri escepte kapablaj personoj, ili majstriĝas preskaŭ sur ĉiuj kampoj, kiun la neceso al ili trudas", kaj laŭ mi, tiu ĉi frazo ege trafe karakterizas la Esperanto-aŭtorojn, ĉar ĉiuj ili verkas, instigitaj de profunda interna sento, kaj en la verko de ĉiuj ni trovas sinceron.

El tiu ĉi libro la legantoj ekscias ne nur detalojn pri la evoluo de la Esperanto-literaturo, sed ili tre bone ekkonas siajn ŝatatajn aŭtorojn. Ekzemple en la konata jam eseo pri Baghy, Benczik formetas la falsan aŭreolon de la Baghy-verkaro, kaj prezentas lin pli reale, pli multflanke. Ne estas strange, ke post tralego de tiu ĉi eseo ni pli profunde estimas la multsignifan kreadon de Baghy.

Per la literaturkritikaj eseoj Benczik instruas nin pli atente legi la Esperanto-verkojn, kaj kritike observi la malfacilan, sed senĉesan evoluon de la Esperanto-literaturo. „Studoj..." stimulas ankaŭ la junajn Esperanto-verkistojn al aktiva, inspira kreado.

Kiam mi fermis la libron, mi nevole demandis min, ĉu post la apero de tiu ĉi verko la recenzistoj de la originala Esperanto-beletro rajtas plu publikigi palajn recenzojn en niaj Esperanto-periodaĵoj? Ĉar oni ne devas forgesi, ke la literaturaj recenzoj kaj eseoj ankaŭ estas beletro, kaj nia celo estas krei talentan Esperanto-beletron.

Georgi *Mihalkov*

Lina Gabrielli

LA DENTOJ DE LA LUPOJ

Amikoj miaj!
Nun kiam la akraj
dentoj de la
lupoj celas
mordi mian
karnon,
vi etendas
la brakon,
tial mi ne timas
la sovaĝan
krion,
pretigante min
al batalo!
Sorto mia
ne gravas.
Vivi aŭ morti
samas por mi.
Sed gravas
ne eviti la
ribelon ĝustan.
Via mano
estas incito
al venko, tamen,
se mi perdos,
mi ne perdos
pro la kuraĝo,
per kiu aŭdacas
mi defendi
miajn ideojn
spite al la risko
de mia vivo.
Eĉ mortanta,
mi vivos!

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto:

Georgi Mihalkov

La knaboj de Paŭlo-strato
de Ferenc Molnár

1. Kiu heroo de la libro eldiras la la sekvajn vortojn:
   „Knaboj! Vi jam certe legis en la manifesto, kia danĝero minacas nin. Niaj spionoj estis en la malamika bivako kaj eksciis, ke la ruĝcemizuloj planas la atakon por morgaŭ."
2. Bonvolu daŭrigi la frazon:
   „Kaj la insulo restis sola en la silento de la..."
3. Kiu portis la leteron de Geréb al Boka?

Limdato por la respondoj: unu monato post apero de tiu ĉi numero.

Ĝustaj solvoj de la demandoj en la n-ro 1980/1: 1. Kelneroj. — 2. Vagabonda muzikisto. — 3. Edwin de Kock.
... kaj en la n-ro 1980/2: 1. La grafino forkuris kun la juna anglo, Morton. — 2. El la romano „Ĉu li? " de Henri Vallienne. — 3. „Pro Iŝtar" aperis en Leipzig, 1924.

Libropremion gajnis: *Teodoro Lőwenkopf*, Emek Hayarden, Maagan, Israelo; *Fogarassy Gábor*, Budapeŝto, H; *Papp Tibor*, Debrecen, H; respektive: *Julia V. Martinoviĉ*, Lvov, SU: *Madarász Gyula*, Debrecen, H. La librojn ni jam sendis per poŝto.

Solvo de la krucenigmo en n-ro 1980/1: **Kiu bati deziras, trovas bastonon.** En n-ro 1980/2: **Ŝerce dirite, cele pensite.**

Libropremion gajnis: *Zuzanna Jankowska*, Varŝovio, PL; *Jan Werner*, Brno, CS; respektive: *Antonina R. Tonti*, Moskvo, SU; *Gracia Rodenhuis*, Aerdenhout, NL. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

LETERKESTO

Al niaj helpantoj: ni konsideras vere helpanto ĉiun, kiu *helpas* la redaktadon per bonvola sendo de konvena materialo *publikinda,* kaj – ni tuj aldonu – *publikebla.* La literatura nivelo de H.V. estas nepre gardenda, kaj ni apogas nin tiurilate al la multaj leteroj de legantoj, kiuj ĝuste la bonnivelon laŭdas kaj postulas! Estas tamen ekster niaj ebloj, ke ni prijuĝu (kaj resendu) nepetitajn manuskriptojn, ja certe verkanto havas la propran kopion, ĉu ne? Kaj manuskriptojn hodiaŭ presejo (ankaŭ redakcio) *akceptas nur,* se konvene tajpita, sur unu paĝo de la folio (!)

Ni esperas, ke Vi, kara helpanto, konsentas ... kaj ankaŭ helpas. Antaŭdankon!

★★★

Kyyoohei Nakazima, Tokio: eĉ se malfruiĝinte, akceptu amikan manpremon pro viaj entuziasmaj vortoj. La distancoj mirinde malpliiĝis – tion atestas ne nur veturantoj, sed ankaŭ la E-aj libroj, eldonitaj en Budapeŝto kaj multe aĉetataj en Japanio, same la japandevenaj volumoj vendataj sukcese en la Budapeŝta E-librovendejo. Pluajn sukcesojn!

★★★

Grigaitis Vincas pedagogo, SU–Litovio, *Vilnius*: Malgraŭ la titolo de nia revuo, nia klopodo restas: ne superŝuti la legantojn per *nura hungara* kulturo. Prezentante ĝin kiel eble modeste, kun plezuro ni publikigas – kiom multe eblas – valorajn pecojn de la internacia Esperanta kulturo. Por esti precizaj: de ties *literaturo* prefere – kaj certe kompreneble.

★★★

Bálint István, H, Kecskemét: tia helpo, kia estas la via, la detala analizado de niaj numeroj, estas ĉiam bonvena dum la redaktaj laboroj. Ja tiaj leteroj metas antaŭ ni la necesan spegulon, sen kiu ofte ni palpadus en la aero, anstataŭ enmanigi skribaĵojn al *konkreta* publiko. Pri sciencaj rezultoj intereson meritaj ni publikas foje (rigardu ankaŭ paĝojn pri akvaj aferoj), sed por kontentigi ankaŭ tiajn dezirojn, baldaŭ venos denove konigo de grava rezulto.

★★★

Moskaluk Voldemaro, SU–Ukraino, *Vladimir-Volinsk:* ŝajnas vere, ke oblikvaj krucenigmoj ne trovis ĉies plaĉon, probable nia publiko restas fidela al la kutimaj. Ni penos kontentigi la tiucelajn dezirojn. Pro la malfruoj de niaj numeroj, la foje difinitaj limdatoj por solvoj, ne estas atentataj ĉe lotado; tion ni jam plurfoje anoncis! Kalkulu simple unu monaton post la alveno de la revuo, kaj *sendu la solvon* per simpla pk – tio sufiĉas!

Korespondi deziras

Esperanto-klubo, en bela regiono, serĉas kontaktojn kun samideanoj tutmonde. Bonvolu skribi al *Kamenec–Podolskij,* ul. Ĉkalova 3, SU–281900. – *Andrzej Domanski* (27) kun ges-anoj hungaraj kaj germanaj pri turismo, gastigado, bk, E-stampoj. PL–259–53 *Kielce* 12, skv. 192. – Reklamkalendaretojn el div. jaroj kol. kaj interŝ. *D. Odintsov,* Litkensa 7–6, *Jalta* (Krim) SU–334 200. – *Markovich Éva* (18) pri junularaj temoj k.a. *Budapest,* Pöttyös u. 3. H–1098. – *Vaitkevičius Antanas* (32) instruisto de angla, int. pri lingvoj, lit., popolkutimoj kaj tradicioj, nepre respondas. SU–Litovio 235 643 *Alsédziai,* Zalioji 4–4. – *Samohin Petro,* Esp-veterano ktm, pĉt. korespondus, SU–352 433 *Majskij,* Krasnodar-regiono, Juĵno-Naberežnaja 7. – *Tomasz Debowski* (25) studento, ktm. pri div. temoj, int. ankaŭ pri lingvoj. PL–58–500 *Jelenia Góra* Wolnośći 47/3. – Magistro *Jerzy Posliszny* ktm. interŝ. E-aĵojn: librojn, pm, glum, gazetojn, insignojn, diskojn, sonbendojn k.a. PL–50–952 *Wroclaw* 17, pk. 1629. – F-ino *Neli Vezenkova* (17) ktm, pri div. temoj BG–5400 *Sevlievo* Komplekso Fr. Engels, Blok 7, vh. B, ap. 29. – Pri budhismo *Bedegi Győző* (32) interŝ. faklit. diverslingvajn, eblas recipr. vizito, H–3100, *Salgótarján* Kemerovó krt D/4, C/f.2. – Kun samaĝuloj ktm, interŝ. bk, resp. garantiata, *Gintaras Jurkaitis* (13) SU–Litovio 235 643 *Alsédziai,* Paupio 7. – Pri ŝako, E-movado, kol. ŝaklibrojn, revuojn, bk, *Stan. Stachanczyk,* PL–32–510 *Jaworno* Nosala 4. D/50. – *Antanas Gvildys* (18) studento, ktm, pĉt, SU–Litovio 243–430 *Mantviliai,* Jurbako raj.

HUNGARA VIVO + Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** Respondeca redaktoro: **D-ro István Nagy.** Arta redaktoro: **Éva Tatár-Farkas.** Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Georgi Mihalkov, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits.** + Cefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechán, Aurél Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** + Budapest, pk. 193. H–1368. Telefono: 141–078, 334–194. + Eldonas: **Hungara Esperanto-Asocio.** + Responda eldonisto: **Tibor Vaskó.** + Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215–96–162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. + Abonprezo por jaro (ses numeroj) Ft 78,– al eksterlando por unu jaro 90,– forintoj. + Peranto al eksterlando KULTURA, P.O.B. 149, H–1389, Budapest Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 7,– Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. – Fejér megyei Nyomdaipari Vállalat, Székesfehérvár. Respondeca gvidanto: Pál Gyenti, direktoro. + **Indexszám: 25 377 ISSN 0018–7704**

hungarocoop

Hungariajn geknabajn vestojn
por aĝo 2—12 jaroj eksportas:

HUNGAROCOOP
H—1370 Budapest 5.
P.O.B. 334

BONAJO
EL HUNGARIO

15 ar 19

HUNGAVIS